

Registered by Australia Post.
Publication No. VBH 1849.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretaro: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 247 (327)

MELBURNO

Jan.-Feb., 1988

IVO LAPENNA
1909 - 1987

La tuta Esperanto-movado funebras la forpason de Ivo Lapenna, unu el la plej grandaj figuroj en la historio de la Internacia Lingvo. Profesoro Lapenna estis la arkitekto de la moderna Universala Esperanto-Asocio. Kiel komitatano kaj estrarano de la Asocio, kaj kiel ĝia prezidanto dum deko da jaroj, li direktis ĝiajn energiojn al la publika prezento de Esperanto al la plej altaj instancoj. Li estas konata kiel ĉefa rolanto en akceptigo de ŝlosila rezolucio favora al Esperanto ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj kiel pledanto por Esperanto antaŭ ŝtatestroj, intelektuloj kaj sciencistoj.

La firma kaj senkompromisa sinteno de profesoro Lapenna pri la seriozezo de la pretendoj de Esperanto faris lin granda malamiko de ĉia misuzo kaj misprezento de Esperanto, kaj de sektismo kaj diletantismo. Li insistis pri plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia Lingvo. Li estis brila informanto por Esperanto — jam en siaj studentaj jaroj en Jugoslavio kaj poste kiel

LEGANTOJ, bonvole notu, ke la Speciala Numero (N-ro 246/326) estis redaktita, kompostita kaj presita en Brisbano.

La paĝo-nombroj de la Speciala Numero rilatas nur al tiu eldono. Por la nuna eldono la kutima paĝo-nombro sekvas la nombradon de la Nov.-Dec., 1987 eldono (N-ro 245/325).

gvidanto kaj inspiranto de la informa laboro en UEA. Tra ĉiuj malfacilaĵoj kaj seniluziigoj li restis senlaca laboranto por la lingvo. Li estas aparte memorata kiel brila oratoro kaj talenta verkisto en la Internacia Lingvo. Multaj ankaŭ memoras lin kiel instruanton kaj inspiranton de tuta pli juna generacio de aktivuloj por Esperanto.

Li estis tutmonde agnoskata ekster la Esperanto-movado kiel gvida figuro en la internacia juro, kaj sian sindediĉon al la idealoj de libereco kaj homaj rajtoj li montris per sia partopreno en la jugoslava lukto kontraŭ faŝismo kaj per multjara studado kaj pledado pri la homaj rajtoj.

Profesoro Lapenna mortis en la Zamenhof-Tago de la centa jaro de Esperanto. Se lia forpaso markis la finon de unu epoko en la historio de Esperanto, despli gravas, ke ni daŭrigu konscie kaj konsciencie lian laboron en la duan jarcenton. Nenio alia pli bone taŭgas por honori lian memoron.

Al lia vidvino kaj al ĉiuj aliaj liaj familianoj, amikoj kaj kolegoj mi esprimas, nome de UEA, sincerajn kondolencojn.

—Humphrey Tonkin, Prezidanto de UEA.

MARJORIE DUNCAN

1912 - 1988

La 18-an de januaro, 1988, en la preĝejo de Sankta Mateo, sur la "Corso" en Manly, **Prof-o Robbie Robertson** prezentis la sekvontan panegiron, antaŭ ol la funebrantaro iris al la kremaciejo:

"Kredeble kelkaj el vi konatiĝis kun Marjorie eĉ pli frue ol mi, sed dum la pasintaj 23 jaroj ŝi ofte petis per sia milda, sed persvada dirmaniero 'Robbie, ĉu eble vi povos diri kelkajn vortojn?' Ŝajnas al mi, ke mi povas aŭdi ŝian voĉon, starante antaŭ vi ĉiuj. Jen mia rajto entrepreni ĉi tiun melankolian devon.

Marjorie naskiĝis la 18-an de marto, 1912 en Coventry, la konata industria urbo en la meza regiono de Anglujo. Ŝi komencis profesian karieron kiel instruistino dum 1932 en aĉa kvartalo de Huddersfield. Estis la epoko de la granda depresio, kaj vivkondiĉoj estis preskaŭ netolereblaj. Ŝi eskapis tiun medion en 1938, vojaĝante al Aŭstralio kiel "interŝang-instruistino", kaj laboris unu jaron en Kanbero kaj Sidnejo. Ŝi ekiris hejmen la 1-an de septembro 1939, atingis Nov-Zelandon, sed devis reiri pro la milit-deklaro kaj denove instruis en Sidnejo.

Ŝi aliĝis al la Nacia Defenda Ligo, nukleo de la Aŭstralio Virina Armeo, kaj en 1942, kiam Aŭstralio estis grave

minacata, ŝi iĝis ŝoforino en la 2-a Aŭstralio Ambulanca Trupo, kaj veturigis ambulancojn en Sidnejo, Port Kembla kaj Novkastelo. Ŝi renkontis multajn geamikojn, kaj precipe amikiĝis kun F-ino Freda Coombs, kiu restis amikino dumvive kaj flegis Marjorie-n sindonege dum la lasta malsano.

Februaron 1946 Marjorie reiris al Anglujo kaj loĝis en Bournemouth, sur la suda marbordo. Ŝi eklernis Esperanton en 1947, en kafeja ĉambro ĉe Southbourne, kie kunvenis la sola E-grupo en tiu regiono. Ŝi rapide progresis, fondis grupon en Westbourne kaj instigis la tiutempe velkintan societon de Bournemouth revigliĝi. En 1948 ŝi instruis Esperanton en 3 kluboj de Bournemouth kaj Westborne, kaj en 1949 ŝi kunorganizis la 34-an U.K. en Bournemouth.

Ŝi edziniĝis en oktobro 1953 al Aŭstraliano, Archie Duncan, kun kiu ŝi enmigris Aŭstralion, kaj en 1959 ŝi inaŭguris klasojn ĉe la vesperlernejo en Manly. Kun siaj studentoj ŝi fondis en 1961 la "Manly E-Klubon" kaj restis prezidanto dum 10 jaroj. Ŝi estis laŭnature instruisto, ŝia entuziasmo estis grandega, kaj ŝia pacienco senfira.

Ŝi estis nelacigebla organizanto kaj elstaris dum la AEA-Kongresoj en Manly 1968 kaj Sidnejo 1980, kaj tre



sukcesaj post-kongresoj en 1976 kaj 1984. Dum la kongreso en Kanbero, 1984, ŝi iĝis "Fratulo de AEA", la unua virino kiu atingis tiun honoron.

Kiel UEA-Delegito ŝi gastigis Esperantistojn el multaj landoj, kaj estis bone konata inter eksterlandaj Esperantistoj.

Marjorie emeritiĝis en 1976 de la "Far West Children's Home", kie ŝi instruis

infanojn dum multaj jaroj, sed ŝi daŭre instruis Esperanton eĉ pli intense, ĉe la "Senior Citizens' Centre", la "Merkreda Klubo" kaj la "Wesley Centre" en Sidnejo. Ŝi aktive organizis kaj partoprenis la agadon de la Ruĝa Kruco.

Dum ŝi ĉeestis la Esperantan Somerlernejon en Barlaston, Anglujo en aŭgusto 1987, montriĝis la fruaj simptomoj de ŝia fina malsano. Post reveno al Aŭstralio lerta fakulo eltrovis, ke mortiga tumoro troviĝas en la c-rbo, kaj kuracrimedo tute ne ekzistas. Ŝi sentis nenian doloron, kaj finfine forpasis la 13-an de januaro 1988. Tiun lastan tagon ŝi konversaciis Esperante kun siaj Esperantistaj geamikoj.

Porĉiame ni memoros la multpacienctan brilan instruistinon, la nelacigeblan kaj entuziasman organizanton, la afablan kaj fidelan amikininon. Adiaŭ, kara amikino Marjorie. Vi estis ja bonegulinio!



ESPERANTO EN TUTMONDA KONGRESO

Kvar instruistoj de Esperanto partoprenis en la 16-a Tutmonda Kongreso pri la Lernado de Lingvoj, organizita de la "Federacio Internacia de Instruistoj de Modernaj Lingvoj", la 4-an ĝis la 8-a de januaro, 1988: Ralph Harry kaj Marj. El-yard (Kanbero), David Curtis (Weston-super-Mare, Britio) kaj Silja Kivekas (Lahti, Finnlando).

Post malfermo de la kongreso de Kavaliro Ninian Stephen, Statestro de Aŭstralio, D-ro Wilga M. Rivaers, de la Universitato de Harvard, prelegis pri interaga lingvolernado kaj instruado.

Ĉar la temo de la kongreso estis "Lerni Lingvojn Estas Lerni Kunvivi" Ralph Harry prelegis pri "La Lernado de Esperanto — por Vivi en Tutmonda Komunumo". Li skizis la evoluon de Esperanto tra sia unua Jarcento, kaj komparis ĝin kun neplanitaj lingvoj. Tiam li substrekis, kiel la logika strukturo de Esperanto faciligas la lernadon, kaj kiel lernado de la internacia lingvo enras tuj internacian homan frataron, tutmondan komunumon. Li montris kiel tiuj faktoroj influis la metodojn de instruistoj de Esperanto, kaj skizis la Cseh-metodon kaj la metodon de Zagreb.

La Esperanto-Klubo de Kanbero organizis en la Kongresejo malgrandan ekspozicion, la kernon de la granda Jubilea Ekspozicio en la Nacia Biblioteko

de Aŭstralio. Oni disdonis ankaŭ ekzemplerojn de "Ĝisdatigo" pri Esperanto, kaj la tekston de la prelego de S-ro Harry.

S-ino Silja Kivekas, kiu estas Prezidanto de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, havis multajn kontaktojn kun kolegoj en Bruce Hall, kie ŝi loĝis kaj ankaŭ en la Nacia Universitato, kie okazis la laborkunsidoj.

Alia Esperantisto, Helen McDougal, estis unu al kvinteto, kiu muzikis en la inaŭguro.

—RALPH HARRY

La 53-a Nov-Zelanda Kongreso de Esperanto

Okazis inter la 12-a kaj 16-a de januaro 1988 en Auckland. Partoprenis kvindek da geesperantistoj, inkluzive de sep aŭstralianoj kaj unu japanino.

Audrey Wood, la Prezidanto de la Aucklanda E-Asocio kaj de la Loka Kongres-Komitato bonvenigis la vizitantojn. Oni laŭleĝis salutleteron de la redaktoro de "Australian Esperantist" (Herbert Koppel) kaj nome de la ĉeestantaj aŭstralianoj S-ro Ray Ross salutis la kongreson.

La ĝis nuna estraro, kiu konsistis ekskluzive de esperantistoj de Wellington decidis ekdeĵ kaj proponis, ke tute nova estraro elektiĝu el la membroj en la regiono de Auckland kaj Hamiltono. Elektiĝis la jena nova Estraro: Prezidanto: D-ro Paul Friedman, Hamilton; Vic-Prezidanto: Brian Fox (Auckland);

Ĝenerala Sekretario: Jo Knight (Auckland); Help-Sekretario: Derrick Knight (Auckland), Kasisto: Mary Richardson (Upper Hutt), Estraranoj: Jim Baker (Auckland) kaj Tony Richardson (Hamilton).

Dum tutaga ekskurso al la submara mondo de Kelly Tarlton, kongresanoj povis rigardi ŝarkojn, langustojn, polpojn kaj aliajn marestaĵojn. Poste kongresanoj vizitis muzeon por rigardi specialan elmontraĵon de prahistoriaj maoriaj vestaĵoj. Tio tre interesis speciale al Sylvia Burkitt, kiu instruas teksadon en Sidnejo.

Aŭstralianoj kontribuis al la kongresprogramo per muzikaĵoj kaj kantado. Pluraj Nov-Zelandoj uzis la oportunon kaj aliĝis al la 4-a Pacifika Kongreso.

Letero el la Sovet-Unio

Nia leganto Kay Andersen, Brisbane, ricevis interesan leteron de sia rusa korespondanto. Jen kelkaj interesaj eroj el ĝi:

"Ni vojaĝis al Pollando por partopreni 2 grandajn internaciajn kongresojn. Unue ni iris al Krakovo, kie okazis la 43-a Internacia Junulara Kongreso. Tio estis nia unua internacia kongreso. Krakovo estas tre bela, pitoreska urbo, iama ĉefurbo de la lando. Al la kongreso venis ĉirkaŭ 1000 esperantistoj el 44 landoj, ĉefe gejunuloj. Estis abunda kongresprogramo, sed la plej interesa "programero" estis la ebleco senprobleme komunikiĝi kun esperantistoj el multaj landoj.

Dum la kongreso estis organizita ekskursata tago. Ni elektis ekskurson al unu el la plej teruraj lokoj — al faŝista koncentrejo Auschwitz. Terurege! Oni mortigis tie 4 milionojn da homoj el tuta Eŭropo. La homaro devas neniam forgesi tion, por ke ne ripetigu tiuj malĝoegaj okazintaĵoj.

Post la Krakova Kongreso ni iris karavane al la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio. Tio estis vere grandioza festo de nia kara lingvo. Venis preskaŭ 6000 da esperantistoj el 62 landoj. Tiel grandega homamaso, ke ni eĉ ne sukcesis trovi kelkajn niajn leteramikojn.

Dum ekskursata tago ni veturis per aŭto, kun hispanaj amikoj, al Zelazona Wola, la naskiĝloko de Frederyk Chopin. Ĉarma eta vilaĝo, kie la naturo mem instigas komponi muzikon.

Alex Mikishev, P.O. Box 184
SU - 614056 PERM, U.S.S.R.

26-a AŬSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

11-a-20-a de septembro, 1988,
Brisbano.

Estraranoj de AEA unuanime konsentis al propono, ke Trevor Steele estu Kongresa Prezidanto, ĝis la elekto de nova Prezidanto de AEA dum la Jarkunveno. Trevor, kiu estas Prezidanto de LKK, akceptis la proponon.

5-a Listo de Aliĝintoj:

49. Bradley McDonald, Auckland, NZ
50. Gwenda Sutton, Wellington, NZ
51. Les Scott, Manly
52. Bess Scott, Manly
53. Des Langman, Christchurch, NZ
54. Lydia Greig, Masterton, NZ
55. Mary Cooper, Masterton, NZ
56. Irene Rae, Upper Hutt, NZ
57. Mary Richardson, Upper Hutt, NZ
58. Eileen Olsen, Masterton, NZ
59. Bill Olsen, Masterton, NZ
60. Janet McClelland, Manly
61. Ann Hearn, Melbourne
62. John Moore, Emu Park, Q'ld.
63. Nora Moore, Emu Park, Q'ld.
64. James Harwood, Sydney
65. Max Wearing, Adelaide
66. Vera Payne, Perth
67. Joy Garad, Masterton, NZ
68. Florence Emms, Melbourne
69. Eunice Graham, Manly
70. Dr. Paul Friedman, Hamilton, NZ
71. Tom Elliott, Sydney
72. Mavis Elliott, Sydney
73. Kep Enderby, Sydney
74. Dorothy Enderby, Sydney
75. Herbert Sweney, Auckland, NZ
76. Decia Shonhan, Brisbane
77. Gilbert Shonhan, Brisbane
78. Margaret Barkley, San Francisco, USA

Statistiko: Kvinslando 24, N.S.K. 20, Nov-Zelando 14, Viktorio 7, Usono 3, Suda Aŭstralio 3, A.C.T. 2, Okc. Aŭstralio 2, Ĉinio 1, Belgio 1, Britujo 1.



• **PERTO:** La jarkunveno okazis la 2-an de dec. 87. 36 klubanoj ĉeestis. Ni planis por la venonta jaro rilate al klasoj kaj publika informado kaj elektis novan komitaton: Prez. John Harvey; Vic-Prez. D-ro John Mills kaj Margaret Chandler;

Sekretarioj Vera Payne kaj Riet Bennet; Kasisto: Dulcie Sawkins; Libroservo: David Poulsen; Informado: Len Eddington; Redaktoro "Nigra Cigno": D-ro John Mills.

La Zamenhofan Feston ĉeestis 65 personoj. Ĉiuj ĝuis la etoson de la festo, ankaŭ la bufedon, muzikon kaj kantaĵon. La ĉefa afero de la vespero estis la Festparolado de David Poulsen. Li pritraktis D-ron Zamenhof kiel verkiston, kaj ties kreivan talenton.

La tagon post la Z-a Festo kaj kiel parto de la Centjara Jubileo de Esperanto, arbo estis plantita ĉe la Kolegio de Alterada Edukado de Mt. Lawley. Latuna ŝildo atentigos vizitantojn pri nia jubileo. D-ro Keith Suter, patrono de AEA kaj la unua Direktoro de la Triuna Pac-Esplor-Instituto plantis la arbon. Aliaj eminentuloj ĉeestis: D-ro Ken Jack, dezano de la lingva fako de la Kolegio, D-ro Jan Malcolm, estro de la lingva fako en Mt. Lawley kaj reprezentantoj de la urba estraro kaj de la Eduka Departemento. Nia vic-prezidanto, D-ro John Mills, invitis nin post la ceremonio partopreni socian kunvenon. Ĉirkaŭ 25 E-istoj ĉeestis. La arbo estas speco de aŭkalo, Angophera Floribunda.

La Matilda Festo okazis (22-a ĝis 25-a de jan.) en Mueller Parko, Subiaco. Multa laboro estis farita de Len Eddington, Vera Payne kaj Owen Loneragan. Multaj vizitis la budon, kelkaj eĉ promesis partopreni klasojn. Ni havas 2 klasojn, unu por komencantoj, unu por progresintoj. Krom la klubaj klasoj Vera instruas 8 novulojn kaj ankaŭ daŭrigas siajn vendredo-matenajn kunvenojn.

—RENE SMEETS

• **ADELAJDO:** La 22-an de dec., 1987, mi estis telefonata de la velŝipo "Dar Młodzieży", unu el la altaj ŝipoj, kiuj partoprenas la celebradon de la 200-jariĝo de Aŭstralio. Ĝi estas pola lernejšipo kaj unu el ĝiaj instruistoj, s-ro Marek Meller, estas bona esperantisto. Kelkaj Adelajdanoj sekvis inviton de s-ro Meller kaj vizitis la grandan "Trimastulon". Li montris al ni la tutan ŝipon kaj regalas nin per trinkaĵoj kaj manĝaĵoj.

Je 23/12 S-ino v.d. Boogaard invitis la polan mariston kaj niajn membrojn al amika vespero. Kiel kutime ŝi regalas nin malavare kaj s-ano Meller disdonis fotoeraĵojn de sia ŝipo kaj klarigis

ĉion, kion ni volis scii. En 2 aŭtoj ni iris al Port Adelajdo, kie Marek Meller denove montris al ni sian ŝipon.

—BOB FELBY

• **MELBURNO:** La Zamenhofa Festo (12-a de dec.) okazis en la Skoltina Halo de Melbourne per la nun poulara komuna vespermanĝo. Ĉeestis 23 Esperantistoj kaj amikoj, inter ili ankaŭ Gerhard Fuhl, vizitanto el Germanio, kaj Ted O'Brien kaj Cliff Hall el Geelong.

S-ro Gerald Tuman enkondukis la programerojn kaj bonvenigis la ĉeestantojn. F-ino Isabel Gale ravis per "stilo-fona" ludado kaj gvidis ĉarman kantaĵon de la Waverley-grupanoj.

Federacia prezidanto Jack Fallu prezentis "Revuon 1987", dum anoj de la Oakleigh-Grupo kontribuis diversajn erojn. La Festparoladon "Esperanto Centjara" donis Herbert Koppel. Li rakontis pri la grandaj oferoj kaj malfacila laboro de D-ro Zamenhof kaj la granda helpo, kiun la Majstro ricevis de la unuaj pioniroj. La amika Festo finiĝis per la kantaĵo de "La Espero".

En decembro kaj januaro Melburnaj esperantistoj havis tri tre interesajn vizitantojn. Juna esperantisto el Landau, Germanio, Gerhard Fuhl, restis dum kelkaj tagoj inter ni antaŭ ol daŭrigi sian ĉirkaŭmondan vojaĝon al Nov-Zelando. Je 19-a de decembro ni havis la plezuron bonvenigi F-inon Indrani Beharry-Lall, UEA-delegitino el Burnaby, Brita Kolumbio. Laŭprofesie optometristo, ŝi venis por esplori la eblecon labori en sia profesio en Aŭstralio. Ŝiaj ŝancoj estas tre bonaj kaj post reiro al Kanado ŝi provos enmigri Aŭstralion.

Marek Meller, entuziasma esperantisto kaj instruisto sur la pola lernejšipo "Dar Młodzieży" invitis nin je 1-a de januaro por inspekti sian modernan velŝipon. Li montris al ni la tutan ŝipon kaj regalas nin en sia kajuto per polaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj.

La Esperanto-Grupo en **OAFLEIGH** elektis la jenan estraron: Prez. S. Kanački; Vic-Prez. Jack Fallu; Sekretario: Margaret Warr; Kasisto: Ivy Fallu.

La **MALVERN** — Grupo elektis estraron por 1988: Prez. Don Pescod; Kasisto: Beryl Pescod; Sekretario kaj Federacia Reprezentanto: Val Fotheringham; Publikaj Rilatoj: Shirley Betts.

• **MANLY:** La 21an de januaro 20 "Manly" — kaj Sidneianoj vizitis la polan velŝipon "Dar Młodzieży" kiel

gastoj de la kadetinstruisto kaj esperantisto Marek Meller. Li bonkore kondukis nin tra la bela ŝipo, kiu vizitis Sidnejon por la ducentjaraj festoj. Tri tagojn poste, dum la mateno, Bettie kaj Eric Hart montris al Marek la havenon, lian velŝipon kaj aliajn vidindaĵojn de aeroplano, kiun Eric mem pilotis. Poste 25 "Manly"-anoj gastigis lin en la hejmo de Eunice Graham, kie li tre intere iĝis pri la jarkunveno, kiu sekvis la lunĉon.

Rita Dunbar prezentis al Marek belan libron pri Sidnejo de la aero kaj veturigis lin al sia hejmo apud Gosford.

Dum la jarkunveno elektigis: Patrono: K. Smith; Prezidanto: R. Robertson; Vic-Prezidantoj: E. Graham kaj A. Cocking; Sekretario: B. Cleminson; Kasisto: R. Springer; Libro-Agento: H. Stone.

—EUNICE GRAHAM

● **SIDNEJO:** La Zamenhofa Festo okazis en la Esperanto-Domo en Redfern, je la 12-a de decembro. La festparoladon faris D-ro Keith Bowling pri la temo "Ni rigardu malantaŭen, ĉirkaŭen kaj antaŭen". Manlianoj prezentis teatraĵojn kaj James Harwood montris per videobendo programon de "Kanalo Naŭ".

● **KANBERO:** Je la 3-a de februaro okazis la Jara Ĉefkunveno kaj oni decidis kunveni ĉiujade de la 5.30-a ĝis la 9.00-a en la "Migrant Resource Centre".

Ni bonvenigis la eminentan kalifornian esperantiston Jim Cushing, kiu konsentis instrui grupon de progresintoj. S-ino Marj Ellyard instruos la komencantojn.

Al la Nacia Biblioteko de Aŭstralio ni donacis, nome de AEA, po unu ekzempleron de "Life of Zamenhof", "La Nobla Korano", "La Sonetoj de Ĉekspiro", "La Dia Komedio", Ĉina Antologio, Japana Antologio, "Aŭstralio, Lando kaj Popolo".

● **BRISBANO:** La Zamenhofa Festo okazis la 12-an de decembro, 1987. Entute 41 personoj ĉeestis la tre kontentan feston, kiu inkludis vespermanĝon, babiladon kaj distraĵojn. Estis plezuro bonvenigi John kaj Nora Moore (kun filino Maureen) el Emu Park kaj Juhani Vilki el Finnlando.

Al la distra programo kontribuis la jenaj: Brisbana Kantgrupo, du aŭstraliaj karoloj; Annie Spencer deklamis du poemojn. La triopo Gaye Phillips, Kay Andersen kaj Peggy Ross prezentis popolokantojn. Trevor Steele, Tom

O'Grady kaj Juhani Vilki ŝercrakontis; la "St. Lucia"-Grupo (Ruth Morrison, Winsome Greenhalgh, June Cullen, Bernice Patterson, Decia kaj Gilbert Shonhan, Ruth Philp) prezentis skeĉlegadon de "Mahadeva kaj la Unua Virino" de J. Baghy. Komunkantado kaj boŝdancado konkludis la distran programon. (Sinceran dankon al Kay kaj Gaye pro muziko kaj gvidado.)

Anoj kunvenis la 1-an de februaro post la ferio-periodo; krom antaŭaj membroj estis plezuro bonvenigi kelkajn komencantojn. Ĉiun sabaton, posttagmeze, aŭ la dramo-grupo aŭ la kantogrupo kuniĝas por prepari kongreserojn. Interterpe L.K.K. laboradas pri diversaj aspektoj rilate al la A/P Kongresoj en septembro.

Bona novaĵo el Caloundra, kie Annie Spencer instruas al 10 komencantoj; en Atherton Marie Mueller instruas al lastjara grupo kaj kelkaj komencantoj ĉijaraj.

—RAY ROSS

● **LAUNCESTON, Tas.:** Je 10-a de dec., 1987, M. LeFevre raportis al Ralph Harry: "La 14-an de decembro ni plantos arbon (Meta Sequoia Glyptostrobooides) en tre bona loko en la ĉefparko (City Park). Ni surmetos bonan ŝildon. La urbestro faros la plantadon."

● **GRATULON** al la jenaj kandidatoj pro sukceso en ekzamenoj:

En la **ELEMENTA** sukcesis:

Tim J. Curnow (Kanbero) kun HONORO; S-ino Debbie Forte (Stoneville, Okc. Aŭstralio) Niĉjo S. Nicholas (Melburno) kun HONORO.

En la **SUPERA** sukcesis:

Niĉjo S. Nicholas (Melburno) kun HONORO.

"**Heroldo de Esperanto**": La redakcio translokiĝis de Madrido al Torino (Italio). Sendu korespondaĵojn al: S-ino Ada Fighiera-Sikorska, "Heroldo de Esperanto", Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. — Torino (Italio). Pagojn sendu al S-ino Sylvia Burkitt, 20 Grandview St., Parramatta, NSW, 2150.

ANTOLOGIO DE LA AŬSTRALIA LITFRATURO

Ĉiuj tradukaĵoj estas jam nun ricevitaj kaj kontrolitaj. Kaj la manuskripto estas jam ekspedita al la presistoj. EDISTUDIO, en Pisa, Italio.

Esperble la prezo de la presita libro estos \$25-30.

La projekto kostis al la redaktoro kaj

liaj kunlaborintoj — precipe Ralph Harry (vera subtenanta roko, kaj la movmotoro malantaŭ la Antologio!), Donald Broadribb, Winsome Greenhalgh kaj Trevor Steele — multe da tempo, laboro, kaj mono (pro fotokopiado kaj postkostoj — ĉiu tradukajo devis esti ĉiam sendita kaj resendita per "Certified Mail", nor gardi kontraŭ eventuala perdo). Ni do esperu, ke la rezulto valoros la penon!

Mi kore dankas ĉiujn, kiuj helpis.

—ALAN TOWSEY,
Komisiito por la Antologio

RECENZOJ

JUS APERIS

"THE DREAM STORY", libro virkita en la angla lingvo de D-ro Donald Broadribb (Perth).

Eldonita de CYGNET BOOKS (University of Western Australia Press) \$15.00.

La verko valoros al personoj, kiuj deziras aŭ bezonas pliigi komprenon pri si mem kaj alproksimiĝi al emocia ekvilibro.

—ooOoo—

ENA - INFORMILO estas la organo de la Esperantista Naturkuracista Asocio. Ĝi aperas kvarfoje jare, jara kotizo \$1.00 (usona). Abonojn, artikolojn kaj aliajn demandojn akceptas ĝia sekretario D-ro Puramo Chong, C.P.O. Kesto 3047, Seoul, Korea.

Membro de ENA povas esti ne nur naturkuracisto, sed ankaŭ interesatoj, kiuj dezirus scipov kaj malkovri la enhavon de la naturmetoda kuracado.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$7,393
Eileen & Arthur Oliver, Perth	15
Fay Koppel, Melbourne	100
Ralph Harry, Kanbero	50
Eunice Graham, Manly	50
	<hr/>
	\$7,608

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1987

Antaŭe raportita	\$494
Eileen & Arthur Oliver, Perth	15
Joyce Turner, Rockhampton	20
Marj. Ellyard, Kanbero	5
	<hr/>
	\$534

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1988

Kay Howe, Yeppoon, Q'ld.	\$10
Ruth McGrath, Perth	10
Terry Metherall, Newcastle	20
Eunice Graham, Manly	30
Herbert Koppel, Melbourne	10
	<hr/>
	\$80

KIU SEKVOS?

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de
Ĉina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$15,
2 jaroj \$25, 3 jaroj \$35.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:
Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
Parramatta, NSW, 2150.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

41. Gerald and Ruth Tumman.

Their Exposition goes all round Australia.

When "counting his blessings", Gerald gratefully looks back on four "basics" — a wonderful mother, good health, life in an English country village and a strict Catholic education leading to Church membership for 45 years. Other pieces of good fortune were secure employment, survival after 3 years' service in the Middle East, healthy children and 60 years of safe motoring.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 248 (328)

MELBURNO

Marto-Aprilo, 1988

D-ro TIM EINIHOVICI 1895 — 1988

La 7-an de marto, 1988, unu tagon post sia 93-a naskiĝtago, mortis en Perto D-ro Avram (Tim) Einihovici, amata edzo de Idyss kaj patro de Laura, kuracisto, Esperantisto, tre kara amiko de multaj homoj.

"Doktoro Tim", kiel oni ame nomis lin, naskiĝis en la tiama ukraina provinco de cara Rusio, sed la sorto kondukis lin post multaj aventuroj kaj danĝeroj de la revolucia tempo, unue al Rumanio kaj poste al Italio, kie li daŭrigis siajn medicinajn studojn en la fama Universitato de Pavia. Tie, unu el la profesoroj multe helpis al li kaj fariĝis lia dumviva amiko kaj mentoro. Tiu homo estis D-ro C. J. Caldera.

Sed la profesoro estis aktiva kontraŭfaŝisto kaj pro tio devis forlasi Italion en la dudekaj jaroj. Li migris en Okcidentan Aŭstralion. En 1939, kiam minacis milito en Eŭropo, sekvis lin la familio Einihovici, ĉar intertempe Tim edziĝis al polino Idyss kaj fariĝis patro. Tim, lerta specialista otolaringologo, praktikis kiel "generala" kuracisto en kampara

"Corrigin", kie li lernis la anglan lingvon, sin orientis al la nova vivo kaj akiris geamikojn, kiuj restis por ĉiam fidelaj. Tie Tim trovis tempon ankaŭ studi Esperanton kaj gvidi malgrandan stud-rondon (1943-46), ĉar, kvankam li sciis pri Esperanto jam de la junaĝo, estis la entuziasmo de la amiko-mentoro Caldera, kiu inspiris lin fariĝi adepto.

En 1946 Doktoro Tim establis sin en Perto kaj tie restis dum la cetero de la vivo — krom dum multaj vojaĝoj al diversaj mondpartoj, preskaŭ ĉiam por partopreni eventojn de la Esperantomovado. Malgraŭ profesia okupateco li dediĉis tempon al lingvaj studoj kaj en 1948 sukcesis en la altgrada ekzameno de la Okcident-aŭstralia Ligo. En 1950 li akiris la Diplomon de la Brita Esperantista Asocio kaj poste venis la Supera Diplomo de A.E.A. Li aktivis en la aferoj de la Ligo kaj en 1974-75 fariĝis Prezidanto. Ekde 1973 li estis Fakdelegito pri Medicino por UEA kaj finance subtenis tiun organizon per membreco de la Societo Zamenhof.

Doktoro Tim atingis altan rekonon

en aliaj kulturaj medioj, i.a. la 'Societo Dante Alighieri' kaj 'Rostrum', sed li ankaŭ subtenis la kulturalan vivon de la Esperanto-movado, prezentante prelegojn kaj en la loka klubo kaj dum aŭstraliaj kongresoj, plejparte pri pensigaj temoj kiaj 'Vivisekcio' kaj 'Eŭtanazio'. Por partopreni en teatraĵoj li montris kaj entuziasmon kaj talenton.

Kvankam li longe aktivis en sia profesio li povis kun la forpaso de la jaroj doni al si ĉiam pli da forpermeso, pli da tempo por partopreni en Esperanto-aranĝoj, do en la lastaj du jardekoj li ĉeestis preskaŭ ĉiun AEA-kongreson kaj tre multajn mondkongresojn. Tiel li kaj lia edzino iĝis mondkonataj en Esperantio.

Jes, ja, en tiu longa vivo Doktoro Tim multon faris — sur multaj kampoj, sed gravas pli ol la faroj la karaktero de la homo. Tio kio elstaris estis lia milda bonkoreco, sed li ankaŭ povis esti firma kiam tio bezoniĝis. Homo idealisma, li estis ankaŭ praktike helpema kaj kun subtila humorsento. Kun Idyss, ilia filino, bofilo kaj du nepoj ni ame kaj danke rememoros lin.

—RUTH McGRATH ("Nigra Cigno").

"Kial 'kibernetiko'?"

Bernard Golden

De tempo al tempo aperas sur la paĝoj de Esperanto-periodaĵoj interŝanĝo de opinioj pri la ĝusta literado de nova vorto. Unu el tiuj diskutoj temas pri 'kibernetiko' (vidu **Heroldo de Esperanto**, 1975, n-ro 1588, p.3). Esperantistino C. Minnaja insistas, ke ĝi devas esti 'cibernetiko' "ne nur surbaze de la formo de la vorto en pluraj modernaj lingvoj, sed ankaŭ analoge al la Esperanto-vortoj 'cigno, ciklo, cilindro', ktp., ĉiuj devenantaj de grekaj vortoj komenciĝantaj per 'ky', kiu en la latina fariĝas 'cy'."

S-ino Minnaja postulas tro da logikeco en la formado de vortoj en Esperanto. Nenie mi trovis regulojn nor la fonetika formado de etnolingvaj vortoj je Esperanto-vortoj. Ofte la procedo estas kaprica kaj arbitra. Eĉ Zamenhof ne ĉiam estis tute konsekvenca. Kial kritiki la formon 'kiberne-

tiko' kaj ne 'kinejo', kiu en modernaj lingvoj kiel la franca kaj la angla komenciĝas per 'ci-' (**cinéma, cinema**). La helena etimo estas **kinéma**. Fakte, la afero ne estas tiel simpla, kiel s-ino Minnaja opinias. Eĉ ekzistas helena vorto, **kustis** "veziko", kiu donas al Esperanto du diverssignifajn vortojn, unu kun 'ki-' (kisto) kaj alian kun 'ci-' (cisto). Latine kaj angle ekzistas nur unu formo komenciĝanta per **cy-** (**cystis, cyst**).

Alia helena litero, kiu ne bone kondutas en Esperanto estas **X** (**hi**). Ĝi aneras jen kiel 'h' (himero, hameleono), jen kiel 'k' (kiasmo, kiromancio). Kelkfoje la formo kun 'h' estas arkaika; la zamenhofaj 'hiono' kaj 'hirurgo' estas hodiaŭ 'kitono' kaj 'kirurgo'.

Ne nur helendevnaj vortoj en Esperanto montras tiun ĉi mankon de reguleco. La franca digramo **ch** (= ŝ) fariĝas 'ĉ' aŭ 'ŝ' en Esperanto (ĉevalo, ĉemizo; ŝoseo, ŝoforo). Anglaj vortoj, kiuj finiĝas per la agant-sufikso **-er** havas tri formojn en Esperanto. En '**klipero**' kaj 'setero' la sufikso restas kiel parto de la radiko, dum en 'kutro' kaj 'bufro' la vokalo **e** forfalas, kaj en 'spinako' kaj 'buldozo' la tuta sufikso perdiĝas.

Esperanto estas evoluanta lingvo de vivanta parol-komunumo. Se konkurantaj vortformoj ekzistas, la uzado — ne perleteraj polemikoj — decidos pri la formo, kiu restos en la lingvo. Mi vetas, ke 'kibernetiko' enradikiĝos, ĉar 'ki' estas pli facile prononcebla ol 'ci' por la plejmulto da popoloj. La sama kialo kuŝas malantaŭ la tendenco anstataŭigi 'h' per alia konsonanto, ne nur en helendevnaj vortoj kiel 'kemio', 'mekaniko' kaj 'kaoso' sed ankaŭ en 'jaktio' kaj 'ĉino'. Estas interese observi ankaŭ, kiel la Fundamenta vorto 'foro' fariĝas arkaika pro la pli ofta uzo de 'koruso'.

26-a AŬSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

11-a-20-a de septembro, 1988,
Brisbano.

Kongreskotizo: \$45; Pensiuloj, junuloj, studentoj: \$35. Antaŭmendo de dormĉambro: \$10.

6-a Listo de Aliĝintoj:

79. Alan Towsey, Tahmoor, N.S.K.
80. Don Rogers, Lower Hutt, Nov-Zelando

81. Gretta Bussell, Wanaka, Nov-Zelando
82. Ruth Morrison, Brisbane
83. Marie Keates, Brisbane
84. Peter Keates, Brisbane
85. Ruth Tumman, Melbourne
86. Gerald Tumman, Melbourne
87. Jack Hawks, Perth, Okc. Aŭstralio
88. Kitty Brisbane, Melbourne
89. Alva Spurrell, Melbourne
90. Sylvia Burkitt, Sydney
91. Riet Bennett, Perth, Okc. Aŭstralio
92. Veronica Egan, Perth, O.A.
93. Eva Trainor, Melbourne
94. Maria Gillam, Melbourne
95. Joan Green, Ormiston, Queensland
96. Ruth Philp, Brisbane
97. Myrtle Straker, Sydney
98. Petro de Smedt, Belgio
99. Kjoko Hata, Belgio
100. Charles Stevenson, Adelaide
101. Richard Stevenson, Adelaide
102. June Cullen, Brisbane
103. Len Eddington, Perth, O.A.
104. Lillian Newman, Brisbane
105. Nell Callaghan, Brisbane
106. Alan Grant, Brisbane
107. Jay Grant, Brisbane
108. Mary Stephenson, Brisbane
109. Magdalen Rozsa, Pt. Macquarie, NSK
110. Paul Rozsa, Port Macquarie, NSK
111. Bernard Heinze, Melbourne
112. Joseph Major, Wellington, NZ
113. Eva Major, Wellington, NZ
114. Kay McCashney, Perth, Okc. A
115. R. Dixon, Wanganui, NZ
116. V. Dixon, Wanganui, NZ
117. Bill Aulsebrook, Forster, NSK
118. Betty Aulsebrook, NSK

Statistiko: Kvinslando 37, N.S.K. 25; Nov-Zelando 20, Viktorio 14, Okc. Aŭstralio 5; Usono 3; Belgio 3; A.Ĉ.T. 2; Ĉinio 1; Britujo 1.

La Pacifika Kantlibro, 42 kantoj el la Pacifika Regiono, jam eldoniĝis kaj estos havebla ĉe la kongreso. Denove ni devas gratuli al Gaye Phillips kaj Kay Andersen pro la taŭga enhavo.

Adreso de la Loka Kongres-Komitato: P.O. Box 313, Sunnybank 4109, Australia.

La najbarino havas la emon eduki la etan Karlon:

"Sciu karuleto, la infanojn alportas la cikonio."

"Eblas, eblas", diras Karleto, "tion jam diris la antaŭa blonda najbarino al mi. Tamen ŝi ekprocesis kontraŭ mia paĉjo." (Hung. Vivo)

Will Firth raportas

El Passau, Bavario, kie li instruas la anglan lingvon en lernejo, Will Firth raportas (resumo de Ralph Harry) 18-an de aprilo: "Novembre mi kun Passaŭa Esperantisto, S-ro Otto Gessner, intervjuiĝis dek minutojn ĉe la ĉi-tiea radiostacio. Espereble la dissendaĵon aŭdis kelkcent homoj.

Antaŭnelonge mia skiza referaĵo pri la rusa anarkiista filozofo Petro Kropotkin, registrita sur sonbendo, disaŭdiĝis kadre de iu programo de Pariza Radio-Esperanto.

Mian hungaran plumamikon mi vizitis pasint-aŭguste en ŝia hejmurbo Pecs (elp: Peĉĉ). Venontjunie, tuj antaŭ mia forvojaĝo al Jugoslavio, ŝi vizitos min en Passaŭ.

Antaŭ du semajnoj, dum la lernejaj paskaj ferioj, mi pasigis kelkajn tagojn en Zagrebo. Mi vizitis denove la E-centron de kies ĉambroj vigle agadas diversaj E-societoj. Mi esperas prezenti referaĵojn tie ĉi-somere. Mi ĝojas antaŭvidante tutan jaron en tiel bela, kosmopolita kroata urbo, kiu samtempe estas unu el la mondcentroj de nia movado.

Tranoktante en la Zagreba junulara domo, mi levigis unu matenon kaj malkovris, ke la juna viro dormanta en la lito sub la mia estas Tim Curnow, membro de K.E.K. Ni pasigis matenon kune, babilante kaj promenanten en la ĉarma malnova parto de la urbo.

Mi deziras sukcesan kaj entuziasmigan tempon al ĉiuj, kiuj intencas partopreni la kongreson en Septembro en Brisbano! Mi intencas venonte direkti pli da atento al Azio, kaj estus danka se, ĉe la Kongreso, kompiliĝus detala adresaro, speciale de partoprenantoj el la ŝtatsocialismaj landoj Ĉinio, Vjetnamio kaj Norda Koreio."

Medaliono de Zamenhof Donaco de Gesinjoroj Torr

Joyce kaj Harry Torr, kiuj nun loĝas en West Gosford, N.S.K., donacis al la Asocio belan oran medalionon kun foto kaj subskribo de D-ro Zamenhof. Ili sugestis, ke ĝi fariĝu premio aljuĝota laŭ kondiĉoj, kiujn mi elpensu kaj anoncu.

Mi proponas, ke la medaliono estu prezentita dum la bankedo de la Kongreso al tiu instruisto en Aŭstralio, kiu instruis, dum la jaroj post la antaŭa Kongreso, la plej grandan nombron da komencantoj. La gajninto, au eventuale ties edzino, portus la medalionon dum la Bankedo kaj tenus ĝin ĝis la posta Kongreso. Tiucele mi aldonis oran ĉenon.

Mi petas al la sekretarioj de lokaj organizaĵoj informi la Sekretarion de AEA pri la instruisto, kiu havis post januaro, 1986, la plej grandajn klasojn en la koncerna regiono. Kompreneble oni enkalkulu nur personojn, kiuj partoprenis en klaso aŭ grupo dum almenaŭ, ni diru, dudek horoj. La lernantoj povus esti aŭ infanoj aŭ plenkreskuloj. La atesto de la sekretarioj de lokaj grupoj estus fina.

—RALPH HARRY.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **PERTO:** Je la 13-a de marto unu el niaj junaj kaj entuziasmaj membroj, S-ino Debbie Forte, surpronis la respondecon por Esperanto-budo en kampara foiro en Mundaring, 35 km for de Perto. Malgraŭ la 40-grada varmeco multaj samideanoj veturis aŭtomobile al Mundaring por helpi aŭ nur doni sian moralan subtenon. Inter la ekspozicioj de agrikulturaj maŝinoj, de fruktoj kaj vendejoj de trinkaĵoj kaj manĝaĵoj, la Esperanto-budo estis elstara. Multaj informiĝis pri la Internacia Lingvo.

La 27-an de marto malgranda grupo (14) partoprenis la marŝon por la Paco. Tio fariĝis por ni tradicio. Ni kunportis banderolon "Esperanto, Lingvo por Paco". Antaŭ la komenco de la manifestacio du el niaj aktivuloj, Vera Payne kaj Len Edington, vendis en mallonga tempo, por la profito de nia Ligo, sufiĉe grandan kvanton da "Coca Cola". Tio pruvas denove, ke iniciati kaj agi valoras pli ol paroladi.

—RENE SMEETS.

—ooOoo—

• **KANBERO:** La klubo nun kunvenas ĉiun jaŭdon vespere en la "Migrant Resource Centre" en la Griffin Centre. Marj Ellyard gvidas tie kurson por

komencantoj. Ralph Harry gvidas studgrupon, kiu legas kaj diskutas artikolojn el MONATO kaj aliaj Esperanto-gazetoj. Tiuj kursoj okazas de de la 5.30-a ĝis la 7-a ptm. Sekvas manĝeto kaj poste de la 7.30-a ĝis la 9-a okazas komuna legado aŭ paroladetoj pri aktualaj okazaĵoj.

Ni ĝojas raporti, ke la sano de Ralph Harry iomete pliboniĝis. Li povas denove legi kaj skribi duokule kaj li rekomencis iom da organiza laboro.

La redaktoro de "Australian Law News" informis, ke baldaŭ aperos artikolo de Ralph Harry pri "La Internacia Lingvo preta por Internacia Juro".

—ooOoo—

• **SIDNEJO:** La neapero de novaĵoj pri la Sidneja Societo ne signifas la malaperon de la Societo. Tute ne! Fakte, dum la jaro ni gajnis kelkajn novajn membrojn kaj ĝis la ĉeeston de multaj gastoj. Du, viro el Finnlando kaj virino el Danlando, ĉeestis dum vizito al Sidnejo de eksterlandaj horoj. La finna grupo kantis kelkfoje en la urbo mem kaj en antaŭurboj. La dana kantistino estis membro de la "F:oro de 3000", kiu kantis dum Pasko dufoje. Brazilano kaj Japanino vizitis nin dum aŭstralia rondveturo.

Tri vizitantoj restos ĉi tie dum kelkaj monatoj. Estis plezuro, ke Hana Mesmerova revenis. Dum Pasko venis Shizuye Kanaya el Japanio. Ŝi lernas la anglan lingvon en Sidneja lernejo. La tria vizitanto estas s-ro Mi Ji-Sheng el Interna Mongolio, kiu restos dum jaro ĉe Margaret Chaldecott.

Nova Estraro elektigis: Prezidanto: Tom Elliott; Vic-prezidantoj: Sylvia Burkitt, Brian Currie, Volo Gueltling; Kasisto: Maria Fatarella; Sekretario: Margaret Chaldecott.

Inter aliaj paroladoj elstaris (1) "Starigado de Terminaro", (2) "Flankokupoj", (3) "Mensogaj vortoj"; (4) "Malsukcesaj provoj de Tom Elliott foti la velsipojn en Botany Bay".

—MARGARET CHALDECOTT.

—ooOoo—

• **MANLY:** La 10-an de marto Robbie Robertson estis la gastparolanto dum la lunĉkunveno ĉe "Legacy House". Proksimume 80 ĉeestantoj tre interesiĝis pri "Paroli al homoj de 42 landoj". Arthur

Cocking, la 28-an de aprilo, amuzis 50 membrojn de la "Manly"-"Probus"-klubo. Kun la helpo de 4 klubmembroj li legis teatraĵeton kaj respondis al demandoj, kiujn li mem sugestis. Sekvis du invitoj al aliaj kluboj.

Dum la pasintaj du monatoj ni havis la plezuron gastigi 4 vizitantojn el Nederlando, nian malnovan amikinson Netti ten Hagen el Amsterdamo, la bonekonatan Sija van Wijngarten el Rotterdamo kaj Rikie kaj Herman Lerch el Harlema.

Je la 19-a de aprilo, post la klasoj en la Vespera Kolegio, Rikie, Herman kaj 12 "Manly"-anoj kunvenis ĉe Eunice Graham por adiaŭi Netti.

La aranĝoj meti ŝildon memore al Marjorie Duncan en Esperanto-Domo bone progresas. —EUNICE GRAHAM.

Konferenco ĉe Bundaberg, 23-25-an de aprilo, 1988

La unua konferenco, 1988, okazis ĉe Bundaberg la 23-25-an de aprilo. Pro la relative granda distanco, pli ol 400 kilometroj norde de Brisbano, nur 17 anoj povis partopreni la semajnfino. La ĉefcelo, krom iom propagandi pri la Internacia Lingvo, estis esplorrigardi la insulon "Lady Musgrave", kie okazos parto de la postkongreso venontseptembre. Anoj el Kaprikorno, Toowoomba kaj Brisbano partoprenis la konferencon. Dum ĝenerala kunsido estis decidite, ke la ĵarpikniko okazu ĉe 'Forest of Fame', la 5-an de junio, kiam ni plantos alian Esperanto-arbon. Pro la kongreso, la normala dua konferenco estas nuligita, sed en majo, 1989, ni kunvenos en Caloundra. Anoj ĝuis la kutiman vespermanĝon kaj postan distraĵon.

Dimanĉe, 10 anoj veturis per speciala pramo al la atolo "Lady Musgrave", 80 kilometrojn for de Bundaberg, kie ni rigardis diversajn specojn de koralo (estas pli ol 350 entute) kaj miriaden da multkoloraj fiŝoj, kiuj abundas tie. La insulo mem estas unu el la tri veraj atoloj de la Granda Rifbaro kaj spektado estas per specialaj boatoj tra vitraĵ-fundoj, aŭ per spirtubo. La insulo mem kreigis el koralo rompita, sablo, konketoj, guano ktp. kaj estas vera birdejo (ĉis 50 specoj inkluzive de Mallongvosta

Pufino ("Mutton Bird") kaj estas kovrita per arboj, arbustoj veprejo ktp. En la laguno estas: kelonioj, tridaknoj, rajoj ktp. sed mankas ŝarkoj! Averteto: se vi ne estas vera maristo, kunportu (kaj glutu) pilolojn kontraŭ marmalsano!

Aliaj anoj vizitis allogaĵojn en la regiono, ekz-e. Domo de Bert Hinkler situantan en propra memorparko, birdedon. Misterajn Kraterojn ktp. Entute tre interesplena konferenco. —RAY ROSS.

Hans BRENDL

Antaŭa ano de la Brisbana Societo, Hans Brendel, forpasis la 31an de marto, 1988. Hans estis membro de BES de 1968 ĝis 1973; li suferis akcidenton kaj ne plu partoprenis klubaferojn. Tamen li daŭrigis sian intereson pri la Skolta Movado kaj eĉ instruis Esperanton al diversaj skolt-grupoj. Pro la Brisbana Societo, Ray Ross ĉestis la funebran ceremonion la 7an de aprilo. —R.R.

Cliff TRONERUD

Forpasis la 14an de februaro Cliff Tronerud; ano de la Kvinlanda Federacio (1975-88) post kiam li transloĝiĝis al War Veterans Home, Moggill, en Brisbane. Bedaŭrinde anoj ne sciigis pri la forpaso kaj tial ne havis oportunon adiaŭi al nia samideano dum la funebra soleno. Cliff partoprenis en multaj kongresoj en Aŭstralio kaj estis esperantisto dum multaj jaroj en Viktorio. —R.R.

• **ST. LUCIA:** Oficistoj elektigis ĉe la jarkunveno, kiu okazis la 25-an de novembro en la domo de la instruistino, S-ino Winsome Greenhalgh. Prezidanto: Ruth Morrison; Vic-Prez: Decia Shonhan; Sekretario: Ruth Philp; Kasisto: Bernice Patterson Libroporanto/Bibliotekisto: Winsome Greenhalgh. Komitato: Sybil Martin, June Cullen, Annie Spencer, Mary Stephenson, Betty Patterson, Connie White.

• **TOOWOOMBA:** Je la 5-a kaj 16-a de marto Carson Thomas legis ĉapitrojn el "Winni la Pu". Je 14-a de marto D-ro Adrian Alan vizitis la societnan kunvenon kaj prezentis informan prelegon pri la Japana Ĝardeno kaj montris interesajn lumbildojn. Je 27-a de marto tri membroj starigis Esperanto-budon ĉe "East Creek Park", okaze de la "Tago de Paco".

Ĉiun merkredvesperon okazas studkunsidoj por legi el MONATO kaj diskuti gramatikon.

—ooOoo—

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de
Ĉina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$15,
2 jaroj \$25, 3 jaroj \$35.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:
Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
Parramatta, NSW, 2150.

RECENZOJ

KANTO DE KANTOJ, el la hebrea tradukis André Cherpillod (Nanterre, Francio; la tradukinto, 1987). 128 p., 21 cm. ISBN 2-906134-03-1. Biblia poemo tradicie atribuita al Salomono; presita paralele kun la originalo kaj amplekse komentariita. Prezo 21,00 gld. ĉe U.E.A.

En ĉi tiu libro, la aŭtoro de **Dictionnaire Etymologique des Noms Géographiques** (kiun mi antaŭe recenzis en la AE) denove montras siajn grandan kleracon kaj vastan lingvoscion. Ĝi enhavas Enkondukon al la historio kaj naturo de la libro, la originalan hebrean tekston, Esperantan tradukon paralele aranĝitan, Filologian Komentaron, Indekson de ĉiuj hebreaj vortoj entenitaj en la **Kanto de Kantoj**, la alfabetojn hebrean, siriakan, fenican, samarian kaj araban, la etiopan silabaron, unu el la plej bonaj koncizaj klarigoj de la hebrea muzikaj kromsignoj, kiun mi iam vidis, kaj ampleksan bibliografion.

Mi tute ne estas spertulo pri la hebrea, sed ne necesas bone scipovi la hebrean por profiti el ĉi tiu libro, ĉar ĉiu hebrea vorto estas tradukita kaj klarigita en Esperanto, kaj ĝi enhavas multe da fascinantaj informoj.

La aŭtoro ŝajnas samopinii kun la pli multaj modernaj kleruloj, kiuj konsideras la **Kanto-n de Kantoj** nura kolekto da amkantoj, de granda literatura valoro sed kun malmulte da religia signifo.

Tralegado de ĉi tiu libro reliefigas la dangeron bazi religian kredon aŭ dogmon sur nura traduko de sankta skribaĵo.

Mi ofte legis, ke **Ester** estas la sola libro en la Biblio, kiun ne mencias la nomon de Dio. Al tio mi mem, ĝis mi legis ĉi tiun tradukon, ĉiam aldonis la **Kanto-n de Kantoj**, ĉar, legante la tradukaĵojn en la angla **Authorized Version** (Aprobata Versio) kaj la **New English Bible** (Nova Angla Biblio), mi nenie en la **Kanto** trovis mencion de Dio. Tamen, en la traduko de Cherpillod, mi trovis en ĉap. 8:6:

“car amo estas forta kiel la morto,
jaluzo estas nefleksebla kiel Seolo,
ĝiaj brulaĵoj estas brulaĵoj
de fajro, flamo de Dio.”!

Efektive, en la hebrea tiel estas: **šalhebet-jah** — “Jah” estanta “unu el la hebreaĵ nomoj de Dio, mallongigo de la tetragramo YHWH” (= Jehovo, La Eternulo). La pli multaj tradukintoj traktas la esprimon kiel intensivon, preskaŭ egalan al “fulmo” (laŭ unu komentariisto), kaj interpretas plejparte kun senco de “ardega flamo”.

En la angla, mi trovis la laŭvortan tradukon nur en la **Jerusalem-Biblio** (“la flamo de Jahveh mem”) kaj la **Nova Mondo-Traduko** (de la Atestantoj de Jehovo) (“la flamo de Joh”). Interese estas, ke Zamenhof tradukis: “la flamo de la Eternulo”.

Alia ekzemplo estas ĉap. 6:12, kiun Zamenhof tradukis per “Tiam mi ankorau ne sciis, ke mia animo elektos min por la ĉaroj de la nobeloj de mia popolo.” La **Nova Angla Biblio** tradukas: “Mi ne konis min; ŝi igis min senti min esti pli ol princo reganta la miriadojn de sia popolo.” La **Jerusalem-Biblio**: “Antaŭ ol mi sciis . . . mia deziro ĵetis min sur la ĉarojn de mia popolo, kiel ĉi ties princon.” Fakte, la hebrea diras, kiel tradukis Cherpillod, nur:

“Mi ne sciis,
mia animo metis min,
ĉarojn de Aminadab.” (aŭ: “ĉarojn de mia nobla popolo”.)

Cherpillod citas du paĝojn da diversaj “tradukoj”, rimarkigante, ke ili “montras ĉefe la brilan imagopovon de iliaj aŭtoroj”. Efektive, la strofo estas tute nekomprenebla — verŝajne pro difekto de la originala teksto.

Mi povas rekomendi ĉi tiun libreton al ĉiu, kiu interesas sin pri la Biblio kaj ĉi ties signifo, aŭ kiu interesas sin pri la studo kaj komparo de lingvoj ĝenerale. Ĝi povus ankaŭ esti tre utila helpilo por studentoj de la hebrea.

—ALAN TOWSEY.

—ooOoo—

LA FENOMENO ESPERANTO, William Auld, Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 120 paĝoj, 21 cm, ilustrita.

Nova Jubilea Eldonaĵo — Bazo por la informado pri Esperanto.

Jen, en 120 paĝoj, resumo de la bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo el la plumo de unu el niaj ĉefaj verkistoj.

William Auld, konata kiel poeto, eseisto, redaktoro, tradukisto kaj Akademiano, prezentas Esperanton kiel la solan racian solvon de la monda lingvo-problemo. Li tion faras ne nur surbaze de ĝiaj lingvaj ecoj — detaligitaj kaj eksplikitaj en aparta ĉapitro — sed ankaŭ per koncizaj sekcioj pri ĝiaj “kelkrilate miriga” centjara historio, riĉa literaturo kaj unike strukturita komunumo de parolantoj.

La multaj prezentitaj faktoj kaj argumentoj aparte utilas kiel bazo por la **verkado de nacilingvaj informiloj**. La libron kompletigas literatura bibliografio, referenclisto kaj represo de la

parolado de D-ro Zamenhof ĉe la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe Maro en la jaro 1905.

Mendu ĉe la Libroservo de A.E.A., Post Office Box 230, Matraville, N.S.W., 2036. (Nederlanda prezo estas 18 guldenoj.)

Heinrich Heine KIE?

Kie, laca pilgrimanto,
Fine ripozados mi?
Ĉu sub palm' en suda lando,
Aŭ ĉe Rejno sub tili'?

Ĉu per sablo mi kovrita
Kušos apud ocean',
Aŭ, malzorge enigita,
En dezert' — per fremda man'?

Kie ajn! Min ĉirkaŭprenos
Ĉie la ĉiel' de Di',
Kun funebra lum' sin tenos
Nokte steloj super mi.
(Trad. Friedrich Pillath)

—ooOoo—

Unua knabo: “Kion vi ricevis je via naskiĝtago?”

Dua knabo: “Mi ricevas ĉiam draŝadon de mia patro.”

Unia knabo: “Sed kial?”

Dua knabo: “Ĉar pro mi li devis edziĝi.” (Hung. Vivo)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

42. BILL LEAH

He DOES have a leg to stand on.

Bill assured me that he would not be embarrassed if I mentioned his lack of legs. Watch Bill swimming: see him dancing. You see a man who refuses to let a physical problem inhibit the expression of his brain, his mind, his soul. He accentuates, in fact he embodies, the positive.

Bill has had an adventurous life. In 1935 as an Army apprentice, he went to Egypt where he changed his trade from carpenter/joiner to telephone and radio technician. He went to Singapore in 1939 and, on Friday, 13th February, 1942 embarked to go to Java — which he **didn't** reach. Bombed in Malacca Strait, swam for 2 hours, was picked up by the Navy and landed in Sumatra. Hitch-hiked to Padang, with some spells in hospital because of a tiny leg wound that turned septic. By navy to Ceylon. Nearly a year in Kandy then on to India and took a course which promoted him from corporal to CQMS Tech. Home after a year with some delays at Suez. After a few months sent by Airborne Signals to Arnhem. Alas, our airborne Jonah received flak wounds in the glider en route and spent the battle days in hospital. Was taken prisoner and sent to the Polish border, near the Oder. When the Russian advance crossed the Oder, the camp was hastily evacuated and the inmates marched right across Germany to Frankfurt on Main whence the Americans eventually flew them home.

Eventually! As a prisoner of war he had been malnourished — almost starved to death — on the Polish border. Imagine his plight when, in the depth of a European winter he was force-marched across the endless plains. Organization, like morale, was all shot to pieces. Ill clad, sleeping in the open, practically no food, no time for medicines. Result, severe frostbite in the feet. When the doctors in England were ready to operate, William was by no means ready to be operated on. Through malnutrition, he was weak "nigh unto death" so he had to wait 3 months — occupying himself meanwhile with embroidery — until he was strong enough to meet the ordeal.

Bill made his home in Nth. Wales where, after receiving artificial legs, he got a job in the inspection section of a radio factory. He later set up his own radio and TV business in Rhyl, but after a few years came out to Australia and changed his job to technical writer and later Editor of a technical magazine.

What of Esperanto? Bill had started to learn it in the Boy Scouts but had had to drop it when he joined the Army to escape the Depression. Yet a few words persisted in memory and he used them to advantage in the P.O.W. camp, for he traded with the Russians who were in an adjoining compound — Red Cross cigarettes for bread, sugar and firewood. Very few words persisted in his brain but some came back when, only a few years ago, he and his wife, Sheila, took it up at a school for Senior Citizens at Abbotsleigh School. After the course finished, Margaret Chaldecott came to help them learn and they joined the Sydney Club.

Bill and Sheila moved to the country a year or so later, but continued learning and attended Summer Schools in Toowoomba and Armidale and, of course, Australian Congresses.

A very enriching experience was their participation in the Budapest Congress in 1983, where they met up with Sheila's pen friend from Sofia, and picked up a few more pen friends there. Bill writes to a Polish nurse, whom they met at the Warsaw Congress and a Czech who wears an artificial leg and walks 6 km. per day. They saw him last year and visited Bulgaria on the way home from the Congress.

Bill inaugurated and maintains a class in Gunnedah — a small N.S.W. country town. Quite an achievement!

As you can see, "at home and abroad" Bill and Sheila are happily steeped in Esperanto.

Bill is an interesting man with an interesting pattern of thought evolved from an interesting way of life.

For some years (before he married Sheila, of course) he lived alone, did quite a lot of writing and regularly attended church as a sincere believer. He took part in Vietnam protests and that put him out of step with his fellow church members. He had met an old man who had served in the Boer War and at Gallipoli but was not a pacifist — indeed, a Quaker. He owned an historic home not far out of town and his many young friends worked the farm almost as a hippie commune. Bill lived there for 6 months (having taken early retirement), took his share of the work and wrote the history of the place. There, he became a vegetarian, lost weight, felt very alive and rekindled a serious interest in Buddhism — in combination, not in conflict, with his Christian beliefs.

Since then, he has never had to visit a doctor — except from time to time to have his artificial legs refitted.

After marrying Sheila he began to eat a little meat and, nowadays "takes a little wine, for his stomach's sake" although previously he had always scrupulously avoided drink — even whilst in the army. He now attends church a little and sings in the choir, but refuses to hand his mind over to others — a wary relic of his studies in Existentialism and Buddhism. He reveres William Auld for his "Infant Race".

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 249 (329)

MELBURNO

Majo-Junio, 1988

NIA JUBILEA JARO 1987

Laŭ raportoj de la amaskomunikiloj la Ducentjara Jubileo de Aŭstralio altiras multe da atento en la cetera mondo al tiu ĉi lando, kaj personaj leteroj de esperantistoj el diversaj kontinentoj konfirmas tion.

Ĉu tiu alia Jubileo, la Centjara de nia lingvo en 1987, sukcesis estigi pli da intereso pri Esperanto?

Se oni komparas la financajn rimedojn de relative riĉa lando kun tiuj de nia diaspora movado, la rezulto por Esperanto estas: nenio mondkua, tamen certe io. Eĉ en Aŭstralio, la sola unulingva kontinento, la komunikiloj ne tute ignoris la internacian lingvon. Oni pensas pri la versaro de Zamenhof: **Eĉ guto malgranda, Konstante frapante, Traboras la monton granitan.** Jes, la guteto atingos sian celon, se ĝi restos konstanta kaj se poste ĝin

helpos ventoj kaj pluvoj. Nia movado rezolute "frapas" per varbado kaj evoluiĝo de la lingvo kaj literaturo . . . ni ankoraŭ atendas, ke historiaj ventoj kaj kulturaj fluoj portu la aferon al ĝia celo.

—ooOoo—

La patronoj de la Jubilea Jaro en Aŭstralio estis grupo de eminentaj civitanoj, el kiuj kelkaj ankaŭ lernis la lingvon. Laŭalfabete ili estis juĝisto K. Enderby, profesoro R. Gates (ekstero de la Universitato de Nov-Anglio), s-ro C. Mott (Aŭstralia ambasadoro ĉe UNESKO), senatanoj M. Macklin (Kvinslando), C. Mason (NSK) kaj J. Vallentine (OA), kaj d-ro K. Suter (direktoro de pacinstituto en Perto).

La Jaron inaŭguris sukcesa kongreso-studsemajno de AEA en nia nun preskaŭ tradicia renkontejo,

Armidalo. Dum la Inaŭgura ceremonio prezidis p-oro Gates; la laŭokazan muzikon komponis s-ro C. Hill de la tiea muzikfakultato. Fine de la ceremonio nia AEA-prezidanto Ralph Harry plantis arbon.

Elstare bona varbilo estas la "vojaĝanta ekspozicio", serio da informtabuloj preparitaj de Gerald kaj Ruth Tумman. Tiu profesinivela ekspozicio gastis en bibliotekoj kaj aliaj lokoj en multaj aŭstraliaj urboj dum 1987 kaj restos uzinda post la plenumiĝo de sia tuja celo.

Du gravaj libroj rilataj al 1987 aperis (os). Jam en 1986 aperis **Historio de Esperanto en Aŭstralio**, dum kies kompilado Ray Ross traktis amason da arkivoj. Ankoraŭ aperonta estas la volumo **Aŭstralia Antologio**, poemoj kaj prozaĵoj tradukitaj de multaj samideanoj kaj redaktitaj de Alan Towsey. Aperis ankaŭ Speciala Numero de **The Australian Esperantist**, anglalingva esearo pri diversaj aspektoj de la internacilingvaj historio kaj kulturo; alia anglalingva varbilo **Esperanto, an idea whose time has come** estis publikigita. Eble menciinda estas ankaŭ **New Leaves**, gazeto pri sociaj problemoj kun konstanta varbrubriko por Esperanto, kiu aperis naŭfoje en 1987 kaj elvokis pozitivajn reagojn inter ekstermovaduloj.

Sur la loka nivelo ĉiuj ekzistantaj Esperanto-grupoj daŭrigis sian kutiman agadon, jam tre gravan kaj foje pezan laboron, kaj kelkaj faris konsiderinde pli ol kutime. Ĉiuj utiligis lokajn gazetojn: ofta oportuno por tion fari estis la reveno de ano(j) de la grandioza UK en Varsovio, ĉar la UK estis en si mem iom rapor-

tinda eĉ por neesperantistaj ĵurnalistoj. Dum sia vizito al Varsovio Sylvia Burkitt metis, en la nomo de ĉiuj Aŭstraliaj samideanoj, florojn sur la tombon de Zamenhof.

La arboplanto en Armidalo estis ripetita en pluraj urboj. Multaj societoj donacis priesperantan literaturon al lokaj bibliotekoj, aŭ delegis ano(j)n por alparoli aliajn organizaĵojn, aŭ provizis instruanton al ekstersistaj grupoj. La aranĝo de s-ro C. Hill de la himno, "La Espero", jam aŭdita en Armidalo, sonoris dum kariljonaj recitaloj ĉe la universitatoj de Kanbero kaj Sidnejo.

Sendube la plej sukcesa paŝo estis la intervjuo de profesoro Robertson de la Manlia Societo kun Ray Martin, la tutnacie konata televidulo, la 3-an de julio, en la elsendo "Tagmeza Programo". Sekvis infornpetoj pri Esperanto ne nur en Sidnejo, sed ankaŭ aliloke.

La ekzamena komisiono de AEA konstatis senteban pliiĝon en la nombro da ekzamenkandidatoj; sed pli bona indiko, ke la agado de la Jubilea Jaro ion atingis, estas la raporto de John Moore, kiu respondecas pri korespondaj kursoj (kutime al unuopuloj sen aliro al Esperanto-grupoj): dum 1987 John vendis kursojn al 69 homoj, kuraĝiga kresko kompare kun antaŭaj jaroj.

TREVOR STEELE (Komisiito).

CASH AWARD 1,000 DOLLARS

The Tim Einihovici award to the value of \$1,000 in memory of the late Dr. Tim Einihovici, who passed away on the 7th March, 1988, will be granted

to a student (aged 18-30) in any Australian tertiary institution, who has a pleasant personality, enthusiasm, idealism, articulate voice, and a keen desire to learn the international language Esperanto.

Dr. Einihovici's dream was to see the introduction of the international language, Esperanto, into schools, for world communication and cultural activities generally.

Interested persons must register their intentions to compete by writing to Mrs. Einihovici.

Mrs. I. Einihovici
88 Newry Street
Floreast Park, W.A. 6014
Phone (09) 387 2475.

They will be given the address of the Australian Esperanto Association for advice as to books, classes, etc.

On the 10th of April, 1989, the time and venue of the examinations will be announced.

Candidates must pass an examination in Esperanto, both written and oral, at the supera level at any recognized branch of the Australian Esperanto Association not later than the 1st of June, 1989.

The winner will represent the Australian Esperanto Youth Organization at "TEJO" (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), bringing greetings to the Congress from Australia, and delivering a paper on a subject to be mutually determined.

A fund also exists to help finance oversea travel.

—Paĉjo! Kial la gefianĉoj eniris man-en-mane la ceremonian halon?

—Laŭ la kutimo, fileto. Ankaŭ la bok-sistoj manpremas antaŭ eklukto.



KIEL MALLONGIGI "AKADEMIANO"

Bernard Golden

En sia artikolo pri la terminaro de brigo (**Heroldo de Esperanto**, 1984, 16/1739/, pĝ. 3) Ralph Harry plurfoje uzas la mallongigon "Ak-no", kiu laŭ la kunteksto devas signifi "Akademiano". Tiu mallongigo estas nekutima, eĉ erara. Konsultinte kelkajn Esperanto-vortarojn, mi trovis, ke ne estas unuanima akordo pri la uzo de mallongigo por "Akademiano". En la franca vortaro de Léger kaj Albault kaj la angla de J. C. Wells, "Ak." signifas nur "Akademiano". Male, en la plej ĝisdata **Listo de Mallongigoj** (1982) de R. Hauptenthal, "Ak." estas la mallongigo de "Akademio" kaj "Akademiano". En **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV) troviĝas "Ak." (= Akademio) kaj "Ak-ano" (= Akademiano). Estas evidente, ke la uzo de unu mallongigo, "Ak.", kun du signifoj ne estas rekomendinda. Se "Ak." signifas "Akademio", estas facile formi la mallongigon por "Akademiano" laŭ analogio.

samideano: s + ano = s-ano
Akademiano: Ak + ano = Ak-ano

Tiel estas pravigita la formo registrita en PIV. Al "Ak-no", la mallongigo uzata de s-ro Harry, mankas la litero "a" antaŭ la "n". Lia mallongigo similas al la vorto "akno", difinita en PIV kiel "pli-malpli ruĝa ŝvelajeto, pli-malpli longe videbla sur la haŭto". Nu, ja estas granda diferenco inter aknoj kaj Akademianoj, do oni ne okazigu konfuzon, uzante la nekonvenan mallongigon "Ak-no".

If "The Australian Esperantist" arrives incorrectly addressed, or if you should change your address, please supply the correct details to our
Despatch Officer:
Mr. Jack FALLU
10 Sumersett Avenue,
Oakleigh South, Vic., 3167

MARŝALO MALINOWSKI VIZITIS LA INTERNACIAN ESPERANTO-MUZEON EN VIENO

La Prezidanto de la Pola Parlamento, Marŝalo Roman Malinowski, dum sia ŝpata vizito al Aŭstrio en Decembro 1987, ne nur renkontis la ĉefkancelieron kaj la prezidanton de la Respubliko Aŭstrio, sed malgraŭ la streĉita tempoplano rezervis tutan horon al vizito de la Internacia Esperanto-Muzeo, kies kulturajn laborojn li alte taksas. Jen tio, kion li skribis i.a. en la vizitlibron de IEMW:

"Mi kore dankas pro la gvidado tra la

Esperanto-Muzeo. Permesu, ke mi danku vin pro la kulturigo de la spirito kaj de la noblaj celoj de Esperanto, kiuj favoras la komprenigon inter la homoj. Kun la esprimo de alta estimo mi deziras al vi sukceson en la realigado de la celoj, por kiuj ni laboras.

17-a de Decembro, 1987

Malinowski

(Protektanto de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto)"

ESPERANTO-LIBROJ EN ANTARKTO

La bazo por sciencaj esploroj konstruita de Brazilo en Antarkto jam havas en la biblioteko librojn pri Spiritismo en la portugala lingvo kaj en Esperanto. La unua ekzemplero al ĝi donacita estas "Paŭlo kaj Stefano", de Emmanuel, eldonita de Brazila Spiritisma Federacio en portugala kaj Esperanta lingvoj.

Poste la esploristino Magna Luzimer de Abreu, de Departemento de Meteorologio de Instituto de Spacaj Esploroj, el

la urbo San-Jozeo-de-Kampo, ŝtato San-Paŭlo, portis kun si la libron "Coragem" (Kerago), de la sama aŭtoro. Ili estas informoj de la esploristo Pedro Rubens Alvin de Carvalho, kiu siavice jam portis tien kolekton de la verkoj de Kodiĝado de Spiritismo (la librojn de Allan Kardec) kaj portos aliajn en la jarfino, kiam li reiros al Suda Poluso por nova periodo de esplorado.

La bibliotekon oni taksas kiel tre utilan en la bazo, ĉefe en la nuna jarperiodo, kiam la vintro estas tre rigora.

(Spiritisma E-Informilo)

26-a AŬSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

11-a-20-a de septembro, 1988,
Brisbano.

Kongreskotizo: \$45; Pensiuloj, junuloj, studentoj: \$35. Antaŭmendo de dormĉambro: \$10.

7-a Listo de Aligintoj

119. Peter Ellyard, Adelaide
120. Grace Sutherland, Sydney
121. Ida Peacock, Melbourne
122. Ren Hua, Shanghai, Ĉinio
123. Mary Hodgson, Caloundra, Qld.
124. Annie Spencer, Caloundra, Qld.
125. Betty Cleminson, Manly
126. Errol Chick, Melbourne
127. Shirlev Gradussov, Perth
128. Owen Loneragan, Perth
129. Helena Sumegi, Orange, NSW

130. Malcolm Ross, Manly
131. Idis Einihovici, Perth
132. Raema Gobba, Perth
133. Yosimi Umeda, Japanio
134. S-ino Satiko Abe, Japanio
135. Kazuo Oosaki, Japanio
136. S-ino Tosiko Oosaki, Japanio
137. Bun'iti Isizaki, Japanio
138. S-ino Utako Oohara, Japanio
139. Takasi Oohara, Japanio
140. F-ino Hitomi Kitabatake, Japanio
141. Ted Woodruff, Vancouver, Kanado
142. S-ino Dorothy Woodruff, Vancouver
143. Karl Renschler, Germanio
144. William Menary, Adelaide
145. Bill Clarke, Perth

Statistiko: Kvinslando 39, N.S.K. 29, Nov-Zelando 20, Viktorio 16, Okc. Aŭstralio 12, Japanio 8,, Suda Aŭs-

tratio 7, Usono 3, Belgio 3, Ĉinio 2, Kanado 2, A.Ĉ.T. 2, Britio 1, Germanio 1.

La L.K.K. petas kontribuojn al la vesperprogramoj, aŭ kantojn, aŭ poem-ojn, aŭ ian distraĵon.

La Brisbana Esperanto-Societo partoprenos en: La Drama Konkurso por Trofeo "Herbert Koppel", la Kanto-Konkurso por Trofeo "Fritz Mueller-Sorau".

Adreso de la Loka Kongres-Komitato: P.O. Box 313, Sunnybank 4109, Aŭstralio.



o **PERTO:** Aprilo alportis siajn sukcesojn kaj malsukcesojn. Malbone estis, ke mia malgranda klaso fiaskis. Studentoj forvojaĝis, aliaj sekvis aliajn interesojn. Nova studento tamen kontaktis min, kiu energie studadas por gajni la premion donacotan de S-ino Einihovici, memore al la forpasinta D-ro Einihovici, per ĉeesti eksterlandan U.E.A.-kongreson.

La movado estis reprezentita de 15 anoj ĉe la Palmdimanĉa porpaca demonstracio. Ges-anoj Vera Payne kaj Len Eddington vendis trinkaĵojn ĉe tiu okazintaĵo profite al la Ligo. Chris Dean kaj Janet White vendis varojn donacitajn de Liganoj.

Tre bona Esperanto-etoso karakterizis la piknikon ĉe S-ro Eric Hewitt. Proksimume 20 anoj ĝuis la kuneston. Du gastoj, S-ino June Miles kaj S-ino Sija Wijngaarden el Londono kaj Amsterdamo ĉeestis.

S-ino Rita Dunbar estis nia gasto en la hejmo de S-ino Einihovici, poste en la domo de S-ro Dean.

Espereble ankaŭ en aliaj E-centroj kelkaj junuloj interesiĝas pri la financa helpo donacota de S-ino Einihovici al tiu komencanto kiu plej bone trapasos la ekzamenon antaŭ la unua de junio 1989.

—RENE SMEETS.

OTILIE STREMPER

La 15-an de junio 1988 forpasis en Perto **F-ino Otilie Emilie Stremper**, unu el la plej elstaraj Esperantistoj en Okcidenta Aŭstralio.

Kvankam en la lastaj jaroj ŝi multe aktivis en la Bahai-movado, ŝi tamen ĉiam restis fidela al la Esperanto-movado.

En 1948/49 ŝi estis A.E.A.-Sekretario kaj en 1954 ŝi sukcese plenumis la rolon de Prezidanto dum la 9-a Aŭstralia Kongreso en Perto. Dum la kongreso en Perto en 1986 ŝi sukcese aranĝis specialan kunvenon por la kongresanoj kun la Baha'anoj kaj faris memorindan paroladon.

Ŝi gvidis sennombrajn Esperanto-kursojn kaj per sia personeco kaj sincereco varbis por nia movado aron da havindaj personoj.

Ŝia morto forprenis el la movado valoran aktivulon en Okcidenta Aŭstralio.

o **ADELAJDO:** Mardo, la 28-a de junio 1988, estas historia tago en la Esperanto-movado de Suda Aŭstralio, ĉar tiun tagon fondiĝis la Esperanto-klubo, 19 membra, de la Universitato de Adelajdo. Ĝia angla nomo estas "University of Adelaide Esperanto Club" (U.A.E.C.) kaj en Esperanto ĝi nomiĝas "Esperanto-klubo de la Universitato de Adelajdo" (E.K.U.A.).

Certe kontribuis al ĝia starigo la premio de \$1000 promesita de S-ino Einihovici al tiu junul(in)o, kiu plej bone povas lerni la lingvon en la daŭro de nur unu jaro kaj tiam preskaŭ tuj poste reprezenti la Aŭstralian Esperanto-junularon en Kerkrade en Nederlando en 1989.

La novan klubon ni bonvenigas kaj esperas, ke ĝi havu multe da sukceso inter la junularo. Kunvokanto de la nova klubo estas Jozefo Wearing, "Jane" estas ĝia sekretariino kaj Bahram Mojarrabi estas ĝia kasisto.

Nia membro Jennifer Jefferies, kiu bone konas "Alex", la virinon kun la bela voĉo ĉe Radio-Stacio 5EBIFM, uzis tiun "Alex" por havigi intervjuon kun Makso Wearing, la 29-an de junio. Ankaŭ "Angelo", alia populara Radio-

personeco intervjuis Makson, kiu parolis 20 minutojn pri sia amata lingvo. Unue li pruvis, ke Esperanto ankoraŭ vivas. La du "A"-oj, Alex kaj Anĝelo, konstante pafis demandojn al Maks, kiu sciiis perfekte respondi la tutan tempon.

Makso parolis pri ĉio ekde Bahaismo ĝis U.E.A. Li diris, ke por la monda progreso necesas, ke ni havu facilan neŭtralan lingvon. Li menciis sian mondvojaĝon en 1987 kaj diris, ke ĝi estis tre facila dank' al la uzado de Esperanto. Li parolis tre elokvente pri la "Pasporta Servo" kaj montris, ke li havas detalan scion pri la historio de nia movado. Li ankaŭ menciis la lingvo-faŭson en U.N. kaj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo. La du "A"-oj aŭdinte lin ne forgesis inviti lin denove por diskuti la gazetojn kaj literaturon de Esperanto kaj ankaŭ por aŭdi ion pri la lokaj kluboj. —B. FELBY.

Denove aperis "TAMEN PLU", la organo de la Adelajda Societo, kiu nun kunvenas ĉiun duan kaj kvaran lundon de la monato en la Kvakera Domo.

La jara ĉef-kunveno okazis je la 13-a de junio. Elektigis la jena Estraro: Prezidanto: Petro Ellyard; Vic-Prezidanto: Bob Felby; Sekretario Bill Menary; Kasisto: Indrani Beharry-Lall; Bibliotekisto: Margaret Furness.

• **KANBERO:** La 17-an de junio S-ro Ralph Harry paroladis ĉe Bankedo de la "Lions Club" de Kanbero, pri la temo "Kio taŭgas rilate la Olimpiajn Ludojn". Partoprenis ĉirkaŭ 50 "Leonoj" kaj okazis vigla sesio de demandoj post la parolado.

S-ro Harry sendis kopion de sia parolado al S-ro Ronald G. Harvey. Administranto de la Aŭstralia Instituto de Sporto. S-ro Harvey indikis, ke li ŝatus aŭdi pli pri la eblecoj de Esperanto por helpi al atletoj komuniki dum internaciaj sportaj eventoj. S-ro Harry promesis donaci al la Instituto ekzempleron de la libreto "Saluton Amiko/Amikino", kiun eldonis kanadaj esperantistoj por la Vintraj Olimpiaj Ludoj en Calgary ĉi-jare.

• **SIDNEJO:** Je 2-a de majo Hanna Messnerova legis artikolon pri Ĉefioslovakio. Semajnon poste Sylvia Burkitt distris nni per ludoj. Tom Elliott (16/5) prezentis sonbendojn de famaj esperantistoj. La 23-an de majo Profesoro Mi

Ji-Sheng rakontis pri sia hejmlando, la Interna Mongolio; li ankaŭ montris kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn.

• **BRISBANO:** La 19-an de junio, anoj de la Federacio veturis al la "Forest of Fame" (Arbaro de Renomo) apud Lowood kaj akceptis inviton estiĝi "parto de la aŭstralia heredaĵo"; ni plantis nian propran arbon, dediĉitan al la memoro de Doris Sinclair, iama prezidantino de nia Federacio. La estonta "Arbaro de Renomo" enhavas ĉirkaŭ 100 arbojn. Estas interese legi eĉ nun la nomojn de eksterlandanoj kaj aŭstralianoj; ĉiuj konsulejoj, ekzemple, jam plantis arbojn tie. La tuta areo estas plena de arboj, arbustoj, floroj kune kun indiĝenaj bestoj kaj birdoj, kiuj libere vagas en propraj loĝlokoj.

Ni dankas al Lillian Newman, kiu donacis la arbeton. Anoj poste vizitis la Biendomon "Bellvue", ĉe Coominja, historia konstruaĵo, kiun administras la "Nacia Kuratoreco". —R. ROSS.

• **FORSTER, N.S.K.:** Ekzistas nun du novaj grupoj en Forster kaj en Taree. Post la Somera Lernejo en Armidale ni komencis klason en Forster. Poste, komenciĝis klaso en la "Adult Education" de Taree (35 kilometrojn for de Forster). Entute ni nun havas 15 lernantojn. S-ino Magda Rozsa restas en kontakto kun ni kaj vizitis nian grupon antaŭ ne longe.

—BETTY kaj BILL AULSEBROOK.

• **MANLY:** Manly kaj Sidnejanoj denove spertis ĝuindan semajnfino en Kanbero kiel gastoj de la Kanberanoj. Marj Ellyard kaj Ralph Harry bonkore aranĝis tre interesan programon por 14 vizitantoj.

Sabaton, la 11-an de junio, okazis kampara ekskurso al la farmbieno de Jack Walters. Post bankeda lunĉo ĝiuj partoprenis la plantadon de kverko memore al nia vizito. Vespere estis publika kunveno en la "Casey"-Biblioteko de la Instituto de Internaciaj Aferoj, kie situas la Biblioteko de A.E.A.

Nia vizitanto de la Universitato de Interna Mongolio, Profesoro Mi Ji-Shen faris tre informan paroladon pri Esperanto en Ĉinio. Post demandperiodo S-ro Alan Towsey, la redaktoro de la aperanta Antologio de Aŭstralia Literatura, diskutis sian agadon tiurilate kaj ankaŭ

la diversajn metodojn de lingva instruado. Dum refreŝigaĵoj oni inspektis kaj admiris la A.E.A.-Bibliotekon, kiu enhavas 2000 librojn kaj bindigitajn periodaĵojn.

Dimanĉon, la 12-an posttagmeze, estis grupvizito al la Nova Parlamentejo. Ralph kondukis ĉiujn tra la ege impona konstruaĵo kun bone informa esperanta komentario. Poste Ges-roj Harry regalas nin per teo kaj kukoj en sia hejmo. Speciale plaĉis al ni la biskvitoj sur kiuj troviĝis sukeraj verdaj steloj.

Vespere, en la "Migranta Rimedcentro", ĉiuj partoprenis en societa vespero per skeĉoj, ludoj, muziko kaj vidbando de la Kongreso en Pekino.

Lundon, la 13-an, ĉiuj hejmeniris kun rememoroj pri tre feliĉa semajnfino kun gastamaj samideanoj en belega urbo.

—EUNICE GRAHAM.

Biblioteko

Nia biblioteko havas kompletan **La Brita Esperantisto** ekde N-ro 1 (1905) kun escepto pri la jaroj 1924-1930. En Vol. XX mankas N-ro 231 (Junio). En Vol. XXI ni havas nur N-rojn 240, 241 kaj 242. En la aliaj volumoj ni havas nur numerojn 264 (Marto, 1927 kaj 311 (Marto 1931).

Ni estus tre dankemaj se iu societo aŭ membro povus helpi nin per donaco de iu mankanta numero. Ni sugestas, ke vi informu la bibliotekiston (Ralph Harry) pri la numeroj, kiujn vi posedas, antaŭ ol sendi ilin al Kanbero, ĉar ni ne bezonas duoblaĵojn!

La biblioteko havas kelkajn duoblaĵojn en la periodo 1909-1939 kaj ankaŭ multajn de postaj jaroj. Se mankas en via kolekto iu numero, bonvolu informi la bibliotekiston, kiu gardos nur rarajn duoblaĵojn post la fino de la nuna jaro.

FORPISIS F-INO HERTHA MUELLER

F-ino Mueller naskiĝis en Germanio antaŭ 89 jaroj, sed enmigris Briton por eskapi el la nazia reĝimo, kaj laboris profesie kiel farmakologo.

Ŝi venis al Aŭstralio post la emeritiĝo por prizori sian karan fraton, Fritz Mueller-Sorau, kiu estis bone konata kiel vigla fervorulo en la loka Esperanto-

movado. Ŝi interesiĝis pri Esperanto plejparte por akompani kaj subteni la fraton, sed ŝi ĉeestis kursojn kaj kongresojn ĝis siaj lastaj jaroj. Ŝi donacis lian grandan brokolekton al la centra Esperanto-Biblioteko en Kanbero, kaj inaŭguris la "Fritz Mueller-Sorau Trofeon" por hora kantado, kiun ŝi mem prezentis al la venkintaj kantantaroj dum la kongresoj en Kanbero kaj Perto.

La 7-an de majo ŝi eniris malsanulejon kaj mortis la 13-an de majo, 1988. Ŝi estis kremaciita la 20-an de majo ĉe Rockwood-kremaciejo. Profesoro R. G. Robertson kaj S-ino Robertson ĉeestis por reprezenti la Esperantistojn.

—ROBBIE ROBERTSON.

RECENZOJ

Esperantologia klasikaĵo nun en Esperanto

Esperanto: lingvo — literaturo — movado. Pierre Janton. Universala E-Asocio, Roterdamo, 1988. 120 paĝoj, 21 cm.

Aperinta unue en la Enciklopedia Kolekto "Que sais-je?" (Kion mi scias?) de la Universitata Eldonejo de Francio, en 1973, ĉi tiu verko populariĝis ĉe neesperantistoj antaŭ ol la parolantoj mem de la Internacia Lingvo povis konatiĝi kun ĝi. En 1976 sekvis eldono en la hispana, en 1977 aperis la dua franca eldono (entute 16000 ekzempleroj), en 1978 eldoniĝis germana traduko kaj en 1987 la nederlanda. Laŭ peto de UEA, la aŭtoro mem pretigis la Esperantan tradukon kaj aktualigis ĝin per pluraj novaj informoj.

Jen scienca kaj tamen populare verkita libro, kiu en konciza formo traktas ĉion esencan pri la Internacia Lingvo: historio de la planlingvoj, origino de Esperanto, la lingvo mem, ĝiaj esprimivoj kaj literaturo, la Esperanto-movado. Ni ne disponas pri alia verko, kiu tiel koncize armis nin per ĉiuj bazaj scioj, tiel necesaj por kia ajn sukcesa argumentado kaj informado pri Esperanto.

Pierre Janton (1933–) estas profesoro en la Universitato de Clermont-Ferrand (Francio), kie jam de multaj jaroj Esperanto estas instruata.

Mendu ĉe la Libroservo de A.E.A.,
Post Office Box 230, Matraville, N.S.W.,
2036. (Nederlanda prezo estas 18 gul-
denoj.)

—Ĉu via edzo ankoraŭ estas somnam-
bulo, eliranta noktomeze?

—Ho, ne plu. La juna najbarino, feliĉe,
transloĝiĝis. (Hung. Vivo)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

43. DON PESCOD

A good Friend

Probably the most significant aspect of Don's life has been his membership of the Society of Friends ("Quakers"). It was at the Friends' House at Toorak that he met the late Dr. Fred Williams and other Quaker Esperantists. It was through them that he took up the study of our linking language.

The first step was to buy "Teach Yourself Esperanto" and apply himself. He practised as he walked along the street, "La arboj estas verdaj", "Jen granda domo" etc. However, talking to himself was not sufficient, so he joined the Malvern Esperanto Group, founded by Ralph Harry but led at that time by the capable Adrienne Paling. After assiduous study for two years, he left the class to follow other interests.

But that was not the end of his Esperanto! Some 10 years later, Don saw a business trip coming up so he "brushed up" his Esperanto with the Malvern Group. Thus he had opportunities to use the language in Yugoslavia. His wife, Beryl — whom he had married in 1943 and who, in due course had presented him with two sons — went with him. Seeing the value of the language, Beryl took it up and became quite accomplished.

(I probably should have headed this article "Don and Beryl Pescod". Sorry, ladies. I confess that I have at times presented the man, when, in fact, his wife is an even better Esperantist than he is. I shall try not to be a male "šovinist" pig, but fear that I am incurably masculine.)

Don did a correspondence course with John Moore and proceeded to become

President of the Esperanto Federation of Victoria and a U.E.A. Delegate. At the moment he is President of the Malvern Group and Australian Representative of the Quaker Esperantist Society.

Don modestly points out that he has not had a spectacular — perhaps not even a colourful — life but he has found strength and comfort "in quietness and confidence" and has achieved a good deal.

In the Depression, Don was 15 and fatherless. He had to help support his mother and 2 younger brothers so he went to work. He studied Engineering at Evening Classes for 10 years — studies which culminated in Diplomas of Mechanical and Electrical Engineering. Then followed a successful career in engineering design, research and development — the last 20 years with C.S.I.R.O.

His career has involved air-conditioning and refrigeration. One of his designs (of a quiet air-conditioner) gained the Prince Phillip Award for the development of an outstanding Australian product. Later Don personally earned the highest award of the Institute of Refrigeration.

Now, having "retired", Don and Beryl live in the rural town of Drouin (pop. 4 000) where they are involved in local affairs such as management of the Lyrebird Villages for the Aged, and giving technical aid to the disabled.

They have spent many hours and much effort in the Esperanto Movement, but feel more than amply rewarded by the friendships in Australia and abroad that they have made through Esperanto. —ARTHUR COCKING.

Registered by Australia Post.

Publication No. VBH 1849.

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 250 (330)

MELBURNO

Julio-Aŭgusto, 1988

73-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

23a ĝis 30a de julio, 1988 — Roterdamo

Nur tre malmultaj aŭstraliaj esperantistoj partoprenis ĉi tiun kongreson kaj ĝis nun neniu aŭstraliano sendis raporton al nia redakcio. Sed ni devas danki al **S-ino Anny Hartwig**, sekretario de la Nuernberga Esperanto-Societo, kiu sendis al ni ĉiujn numerojn de la "Kongresa Kuriero".

Al S-ro Ralph Harry OOMOTO aljuĝis la unuan "Premion Onisaburo Deguĉi"

La 25-an de julio, en la Salono Grabowski, OOMOTO aljuĝis al S-ro Ralph Harry la unuan "Premion Onisaburo Deguĉi". S-ino Terri Metherell (Newcastle) akceptis la premion nome de Ralph Harry kaj legis la jenan mesaĝon de la premiito:

"Mi treege bedaŭras, ke mi ne povas esti kun vi korpe hodiaŭ. Ne volonte mi forestas de Universala Kongreso.

Estas granda honoro ricevi la **Premion Onisaburo Deguĉi**. Dum multaj jaroj mi legadas la revuon "Oomoto", kies kunfondinto estis Onisaburo Deguĉi, kaj mi lernis pri la idealoj de tiu movado, intime ligita kun nia Esperanto-movado.

Mi bone konscias, ke, en ĉi tiu afero, mi reprezentas fakte la tutan Aŭstralian E-Asocion, en kiu troviĝas multaj homoj, kiuj dediĉis sian vivon al la antaŭenigo de Esperanto. Sen ilia subteno mi ne estus povinta fari mian modestan kontribuon al nia afero en la suda kontinento.

La malavara premio, kiun aljuĝis

UEA kaj EPA, multe helpas daŭrigi du gravajn programojn ne nur en Aŭstralio, sed en nia tuta regiono, eble en la tuta mondo.

Unue ĝi helpas nin ebligi la partoprenon de junuloj en niaj tutpacifikaj kongresoj, el kiuj la 4-a okazos, post kelkaj semajnoj, en Brisbano. En tiuj regionaj kongresoj junuloj, kiuj ne povas ĝui la sperton de Universala Kongreso, konatiĝas kaj vivas dum kelkaj tagoj kun junaj Esperantistoj el aliaj landoj kaj kulturoj.

Due ĝi helpas pri la reeldono de kelkaj bazaj dokumentoj de la diplomatio kaj internacia juro, pri kies traduko mi mem helpis, sed kiuj estas malfacile haveblaj en la nuna jardeko. Tio helpas nian movadon ĉe U.N., ĉar plibonigo de la rilatoj inter nacioj dependas de la evoluo de Esperanto kiel preciza lingvo de jura kaj politika komunikado.

Denove mi dankas al tiuj, kiuj faris al mi ĉi tiun honoron, kaj kiuj provizis ĉi tiujn rimedojn por agado en nia regiono por monda paco kaj homara feliĉo.

Mi antaŭdankas vin pro via helpo kaj deziras por vi tre interesan kongreson."

—oOo—

Al la kongreso aliĝis 2319 personoj el proks. 60 landoj. La kongres-komitato avertis, ke "troviĝas multaj ŝtelistoj en la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo kaj pro tio rekomendas ke, por esti sekura, elspezu monon en la kongresa Libroservo, kien cetere la ŝtelistoj kredeble ne venos".

La **Solena Inaŭguro**, dimanĉe (24/7) daŭris du horojn. "Laboro

kaj ĝuo" estis la du vortoj ofte aŭditaj dum la malfermo. Laŭ D-ro Humphrey Tonkin, UEA-Prezidanto, temas pri pilgrimado al la hejmurbo de la esperantistaro. UEA- estrarano Otto Haszpra, en sia enkonduko de la kongresa temo "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo" tuŝis la neceson miksi saĝon kaj amon en onia aliro al la mondo. Pli vasta uzo de Esperanto altigus ĝian reputacion ekstere kaj evoluigus la lingvon mem interne de la komunumo. La ĝenerala direktoro de UEA enkondukis spritan saluton de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu substrekiis la multajn komunaĵojn inter SAT kaj UEA — sed ankaŭ emfazis, ke diverseco estas esenca trajto de vivsistemoj. Kvardek salutojn el diversaj landoj sekvis la brila festparolado de d-ro John Wells, kiu tuŝis plurajn unikaĵojn de la nuna kongreso!

La unua sonraporto pri la Inaŭguro, sendita per radiokablo al Varsovio, estis sekve ankoraŭ samtage aŭdigita. Aparte en Pola Radio oni aŭdigis la tutan, preskaŭ 20-minutan, festparoladon de d-ro Wells.

La Unuan Ĝeneralan Kunsidon de UEA oni devis ĉesigi je nur la 5-a ĉapitro (el 16) pro manko de tempo. La Komitato devis reveni al ĝi post la fino de la Kongreso.

• **Ekumena Diservo** okazis dimanĉe en la ĉefpreĝejo de Roterdamo. Partoprenis proks. 500 gekongresanoj el diversaj kristanaj konfesioj. Predikis pastorino Jelly Koopmans-Schotanus pri "Honoraj emblemoj aŭ cikatraj diademoj".

• **Plendo pri la Jarlibro:** Deko da delegitoj kaj ĉefdelegitoj vigle protestis dum pli ol horo kontraŭ la multaj eraroj en

la Jarlibro '88. Oni demandis ĉu la nunaj komputilaj programoj de UEA estas plibonigeblaj? Ĉu la ĉefdelegito rajtu relegi la presprovaĵojn antaŭ la apero de la Jarlibro?

Mardon, 26-an de julio, okazis la oficiala prezento de **du novaj antologioj**. UEA-Prezidanto Humphrey Tonkin prezentis la **Aŭstralian Antologion**, redaktitan de Alan Towsey, kaj la **Itala Antologio**, redaktita de Giordano Azzi estis prezentita de akademiano Aldo de' Giorgi. Ambaŭ libroj aperis ĉe la itala eldonejo Edistudio. Sekvis gustumado de itala vino.

Okazis **Ŝtorma Akademia Kunsido**. Prezidanto d-ro Albault provis fermi la kunsidon duonhoron antaŭ la antaŭvidita fino. Cefrolis en la publika kunsido la ĉiama malfacila demando pri la esperantigo de nacilingvaj propraj nomoj.

Kvindek personoj partoprenis la **Duan Terminologian Konferencon**. D-ro Detlev Blanke resumis pri kio okupiĝas la Terminologia E-Centro. Ĝi estas institucio de UEA., kies financa bazo estas la fondaĵo Wuester. Ĝis nun aliĝis 115 fakuloj el 28 landoj.

Dum la diskutoj aŭdiĝis kelkaj novaĵoj: Prof. Stop-Bowitz anoncis, ke estas jam plano pri reviziado de PIV. En septembro 1989 oni organizos terminologian kurson en Pisanica (Bulgario).

• **Verkistoj kunsidis:** Trideko da membroj de la Esperantlingva Verkista Asocio kunvenis por aŭdi raporton de Tibor Sekelj, prezidanto de la Asocio. Oni raportis, ke la komisiono por kontrolado de manuskriptoj, sub la gvido de akademiano Reto Rossetti, plenumis laŭindan laboron. Bonan rezulton registris ankaŭ la unua konkurso por originala teatraĵo.

• **La Muzika E-Ligo** festis sian 25-jaran ekzistadon. Estis honorataj veteranoj kiel s-ro Sergio Docal kaj la nuna sekretario Niklaus Weiss (Svislando). La kunveno decidis, ke la dekjara jubileo de la Internacia Floro okazos en Bulgario dum junio 1990.

• **Internaciaj Ekzamenoj:** Deko da homoj trapasis la skriban parton de la Internacia Ekzameno (elementa kaj

meza niveloj). La meza aĝo estis 53 jaroj.

• **Esperanto-Monumentoj:** Hugo Roellinger, la komisiito de UEA pri monumentoj informis, ke je la fino de la Jubilea Jaro estas registritaj 731 monumentoj, stratoj, parkoj kaj similaj oficialaj objektoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. Li ofertas havigi kompletan, riĉe ilustritan liston kun ĉ. 175 fotoj sur ĉ. 130 libropaĝoj. Mendu ĉe S-ro Hugo Roellinger, Theresienstrasse 23, D-8730, Bad Kissingen, FR Germanio.

• **Blindaj Esperantistoj:** 35 esperantistoj, el kiuj 16 vidhandikapitaj el 15 landoj ĉeestis kunvenon de LIBE. Oni prezentis la historion de la revuo "Esperanta Ligilo", jam de 30 jaroj redaktata de s-ro Raymond Gonin (Francio). Lastatempe aperis katalogo de kelkcenttitola Esperanto-kolekto de la Manĉestra brajlo-biblioteko.

• Okazis **Fervojista Kontaktkunveno**, kun partopreno de 80 personoj el 18 landoj. La ĉeestantoj aŭskultis raporton pri la 40-a IFEF-kongreso, okazinta en Francio, en la urbo Perpignan. S-ro Bultman (Nederlando) parolis detale pri la plano konstrui tri kilometran subteran tunelon en Roterdamo, por plifaciligi la enurban trafikon. Speciala trajno portis la fervojistojn al la roterdama haveno, kie ili ricevis abundan impreson pri la ĉiutaga laboro de la fervojistoj por la haveno.

• **Bahaanoj aktivis:** La membraro de la Bahaa Esperanto-Ligo en la pasintaj du jaroj tiel mirinde kreskis, ke ĉi-jare BEL povas aktive partopreni en multaj aranĝoj de la UK. BEL aparte ĝojas, ke pro ĝia instigo la Internacia Bahaa Komunumo kontribuis per donaco de konsiderinda monsumo al la realigo de la Monda Esperanto-Centro en Bialistoko.

BEL okazigis sian unuan prelegon en la 73-a UK, en kiu s-ro Luc Feidangai el Centrafrika Respubliko parolis pri la temo "Aŭroro de nova civilizacio". En dua prelego oni prezentis al la kongresanoj la plej novan bahaan templon, finkonstruitan antaŭ ĉ. unu jaro proksime de Novdelhio (Baratio), unu el la plej belaj konstruaĵoj de la mondo.

• **Jurista Fakkunveno:** Proks. 25 personoj interesitaj pri juro decidis starigi

novan organizaĵon ĉe la venonta UK en Brajtono. Ses grupoj da laborantoj formiĝis: (1) Terminologio; (2) Praktikaj Servoj; (3) Kolektado kaj represado de longaj studoj; (4) Novajletero; (5) Bibliografio de verkoj pri juro en Esperanto; kaj (6) nomo, konstitucio kaj statuto de la nova organizaĵo.

La ĝenerala kontaktpersono por la nova grupo estas: **John Dale, 2251 Pimmit Drive, n. 730, Falls Church, Virginia, 22042-2822, USA.**

—oOo—

Amase jam aliĝis kongresanoj ĉe la budo de la **74-a Universala Kongreso**, kiu okazos de la 29a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989 en Brajtono (Brighton, Anglio). Kongresanoj ankaŭ multe interesiĝis pri la **1990-a kongreso**, kiu okazos en **Havano (Kubo)**. Ankoraŭ unu baldaŭa aranĝo kaptis la intereson de kongresanoj. Tiu estas la **"Pariza Freneza Semajno"** en 1989.

LA 1988-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Timothy Jowan Curnow

Eble ne estus amuze por ĉiuj, sed ĉar mi estis ĉi tie en Eŭropo, kaj ĉar mi havis nenion alian por fari inter la 15-a kaj la 22-a de julio, kaj ankaŭ dankon al iomete de financa helpo de la AEA*, mi decidis ĉeesti la 44-an Internacian Junularan Kongreson en Zagrebo, Jugoslavio. Mi lernis Esperanton dum naŭ monatoj en Aŭstralio, kaj poste mi ne pensis multe pri ĝi dum sep monatoj, kaj mi konsideris, ke internacia kongreso estus ideala loko por pruvi Esperanton pri ĝia deklarita celo — fari komunikadon inter malsimilaj popoloj pli facila kaj egala, lingvo neŭtrala por ĉiuj. Pri tio temis la kongreso: Komunikado en la 21a Jarcento.

Mi ekiris vespere en troplena trajno de Zuriko ĝis Zagrebo. Mi pensis, ke ni povas uzi iomete da komunikado — tri jugoslavoj, du svisoj kaj mi estis kune en kupeo. Mi legis mian libron ĝis interrompita de dormo, kaj ni pasis tra Aŭstrio. Kiel kutime en Okcidenteŭropo ni ne havis problemojn ĉe la landlimoj. La jugoslava doganisto nur tuŝis kelkajn sakojn kaj foriris. Tuj poste unu el la jugoslavoj prenis sian puloveron el la pakaĵejo, kaj eligis la sukcese kontrabanditan radion. Estis malsame la lastan fojon, kiam mi eniris Jugoslavion: tiam iu kontrabandis kafograjnojn!

Ĉe la Zagreba trajnstacidomo matene mi sekvis la multajn gluaĵojn kaj afiŝojn, kiuj min gvidis al la ricevkomitato (unu homo), kiu diris al mi kiun aŭtobuson mi devos trafi por veni al la kongresejo.

Post formala registriĝo, kaj ricevo de la kongresa bulteno kaj alia informajo, kaj post renkontiĝo kun Will Firth, la sola alia Aŭstraliano ĉeestanta la kongreson (kaj nur dum du tagoj), min sturmis subite vid-fotilo kaj jugoslavo, kiu demandis mian nomon, de kie mi venas, kaj kiel mi venis al la kongreso. Ne parolinte pli ol kvin esperanto-frazojn lastatempe, mi povis nur diri "Bone, mi nomiĝas Tim, kaj estas aŭstraliano. Mi estas ĉi tie en Eŭropo dum sep monatoj nu, kaj . . . um . . . kaj nun mi estas ĉi tie". Ne estis tutekorta parolado sed almenaŭ ĉiuj ridis kiam oni montris ĝin en la kongresa televido! Poste mi trovis mian ĉambron, prezentis min al miaj kunĉambristoj (du italoj kaj bulgare), kaj tuj ekdormis.

Tiunokte, post la vespermanĝo (la manĝoj estis eksterordinare bonaj por kongreso!) la organizinta komitato (LKK) prezentis sin al ni kiuj jam alvenis, el la eblaj 800 kongresanoj. La restaĵo de la vespero estis dancoj ("disko-", "roko-", jugoslava, kia ajn), kaj la 'veraj' aferoj de la kongreso komenciĝis nur la venontan matenon kun la Solena Malfermo. Feliĉe, tio estis tre kurta, kaj kun interluoj de jugoslavaj muziko kaj dancoj inter la paroladoj. Ĉi tie oni ekvidis la povon de Esperanto: paroladoj estis en Esperanto aŭ la serbokroata, kaj tradukitaj en la alian, ĉar iuj invititoj estis neesperantistoj. Sed ni, el 42 aliaj landoj, povis kompreni!

La kongreso temis pri Komunikado en la 21a Jarcento, kaj estis tri-taga

scienca kolokvo pri tiu temo, kun parolantoj el sep landoj. Ili parolis pri diversaj de rilataj fakoj, inkluzive pri komputiltraduko, trajnoj, maŝinvokrekono, terminologio kaj, klare la utileco aŭ ne de esperanto en tiuj. La por mi plej interesa prelego estis de Dorin Tamis de BSO en Nederlando, "Distribuita lingvo-tradukado — prezento de la projekto", la projekto uzanta Esperanton kiel interlingvon en maŝintradukado. La prelegoj ne estis devigaj (do troviĝis en ĉambro en kiu povis enveni nur cent homoj), kaj je la sama tempo, ĉiun tagon, estis laborgrupoj de komputiloj, jugoslava popoldanco, artaĵetoj, internacia koruso kaj orkestro, pupteatro, kongresa radio, televido, bulteno, serbo-Kroata lingvo, alpoj-adriatiko-grupo, renkontoj de la biciklista esperanta movado internacia, kaj tiel plu. Ankaŭ ĉiam granda grupo estis ekster la kongresejo sidanta sur la ŝtuparo . . . en la suno-lumo ludanta korbopilkon, futbalon, tablotenison, kaj sin malstreĉanta alimaniere.

Merkrede estis la oficiala ekskurso, kiam ni vizitis la historian urbeton Mumrovec (kie, hazarde (!), naskiĝis Tito, kiu ridetis, ignoris aŭ severe rigardis nin de muro de preskaŭ ĉiu ĉambro en la kongresejo), kaj poste ni iris al la Kastelo de Trakoŝčan, kun artefarita lago, bona loko por posttagmeza malstreĉiĝo.

Ĉiu vespere estis programo kun jugoslavaj popolkantoj kaj dancoj; kaj muzikgrupo kantis rok-, pop-, tango-, kaj ĉian ajn, muzikon, esperante, angle, hispane, kaj portugale. Due favorataj kantoj de ĉiuj estis "Dancu la Bamba" kaj "Gvantanamera", esperante. Alinokte estis teatraĵoj ("Pif, Paf, Puf", absurda teatraĵo de Daniil Harms, verkita en 1927, kaj "La Songo de Ridinda Homo", de Dostojevski, ambaŭ prezentitaj esperante de sovetaĵ grupoj), pupteatro, la internacia vespero, kaj fine la adiaŭa vespero.

Ĉio tio estis amuza, sed povis esti en kiu ajn lingvo, kaj kie ajn. La esperanteco aperis nokte. Du noktoj estis ekstere rok-koncertoj, kaj ĉiam muziko kaj dancoj ĝis 2.30 interne. Sed la plej grava loko de la kongresejo estis sur la ŝtupoj, ekster la ĉefkonstruaĵo. Kie aliloke kaj kiel alimaniere mi povus trinki botelon da ĉampano kun bela bulgarino,

dum diskutado pri la situacio nuna de la aŭstraliaj indigenoj kaj etnaj minoritatoj en ambaŭ landoj, kaj poste danci "La Bamba"-n kun ŝi? Aŭ paroli pri la vetero kun orientberlinano, pri lingvolerno kun jugoslavo, kaj pri sudameriko kun hispano? Kaj kie ali loke mi povus sidi ekstere la tutan nokton kaj kanti esperante, angle, hispane, katalune, germane, hungare, serbokroate kaj itale, kun jugoslavoj, meksikanoj, italoj, bulgaroj, hungaroj, germanoj de ambaŭ landoj, katalunoj, britoj, ĉekoslovakanoj kaj multaj aliaj? Esperanto provis sian rilatecon kaj valoron kiel internacia lingvo, kaj metodo amuzi min! Esperanto, mi kore dankas vin!

*el la Stipendia Fonduso ricevis Timothy \$200 R.L.H.

Aŭstralia Antologio Eldonita

Dum la 73-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo la Prezidanto, D-ro Humphrey Tonkin, lanĉis, kiel Numeron 24 en la Serio Oriento-Okcidento, sub aŭspicioj de UEA, en konsultaj rilatoj kun UNESKO, nian Aŭstralian Antologion.

A.E.A. aĉetis 200 ekzemplerojn, por vendado en Aŭstralio kaj la Pacifika Regiono. La stoko estas sur ŝipo, kiu espereble alvenos sufice frue por ebligi vendadon dum la 4-a Pacifika Kongreso en Brisbano.

La Eldonisto estas EDSTUDIO de Pisa, Italio. La libro de 435 paĝoj konsistas el noveloj, poemoj, eseoj, kaj elĉerpaĵoj el romanoj kaj teatraĵoj el 60 aŭtoroj. La redaktoro, Alan Towsey verkis ampleksan historian enkondukon kaj glosaron.

La Libro-Servo anoncos baldaŭ la aŭstralian prezon. —RLH.

26-a AUSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO 11a-20a de septembro, 1988 Brisbano

Kongreskotizo: \$45; Pensiuloj, junuloj studentoj \$35. Antaŭmendo de dormĉambro: \$10.

8-a Listo de Aliĝintoj

146. Susan Cuthbert, Melbourne
147. John MacLeod, Geelong, Vic.
148. Harry Pamphilon, Melbourne

149. Karolina Gilmore, Brighton, Britio
 150. William Laing, Auckland, Nov-Zelando
 151. Ted Duffy, Brisbane
 152. S-ino Naka Hagiwara, Japanio
 153. Tosiko Huzisima, Japanio
 154. Teiiti Kikuti, Japanio
 155. S-ino Kazuko Kobayashi, Japanio
 156. Toyozo Nisikawa, Japanio
 157. S-ino Tiyo Nisimura, Japanio
 158. Masazumi Sekiya, Japanio
 159. S-ino Setuko Sakamoto, Japanio
 160. Takesi Siraisi, Japanio
 161. S-ino Setuko Umeda, Japanio
 162. Svetislav Kanački, Melbourne
 163. Joan Eddington, Perth
 164. Prof. J. Bachrich, Caracas, Venezuelo
 165. Maria Bachrich, Caracas
 166. Prenda Cook, USA
 167. John Massey, USA
 168. Yvette Massey, USA
 169. Margaret Zarchy, USA
 170. Charlotte Harvey, Toowoomba, Q'ld.
 171. Tom O'Grady, Brisbane
 172. Dulcie Sawkins, Perth
 173. Rene Asselin, Sydney
 174. Jenifer Jefferies, Adelaide
 175. John Abood, Papua New Guinea

Statistiko: Kvinslando 42, N.S.K. 30, Nov-Zelando 21, Viktorio 20, Japanio 18, Okc. Australio 14, Suda Australio 8, Usono 7, Belgio 3, Kanado 2, Venezuelo 2, Cinio 2, Britio 2, A.C.T. 2, Germanio 1, Nov-Gvineo 1.

Adreso de la Kongres-Komitato: P.O. Box 313, Sunnybank, 4109, Australio.

ĜENERALA KUNVENO DE AEA

Brisbano, 13-an kaj 14-an de sept. 1988.

Tagordo:

1. Jarraporto kaj financa raporto.
2. Elektro de Estraro.
3. Diversaj proponoj kaj demandoj.
4. Loko de Somerlernejo en 1989.
5. Loko de la 27-a Aŭstralia Kongreso.

Jarlibro

La Sekretario jam komencis la preparadon de la nova Jarlibro/Adresaro de AEA. Ni jam ricevis kelkajn korektojn de la 1986-a eldono. Por ke la Jarlibro estu kiel eble plej perfekta ni petas ke ĉiu Estrarano informu la Sekretarion pri ofiĉistoj kaj novaj membroj, ŝanĝo de adresoj ktp. en sia regiono.

Kongresanoj:

La Kongres-Komitato laŭeble renkontos kongresanojn. Ni petas kongresanojn TUJ informi la Kongres-Komitaton kiam vi intencas alveni en Brisbano, ĉu per aviadilo, buso aŭ trajno.

ESPERANTO AND INTERNATIONAL LAW

The Australian Law News recently published an article by Ralph Harry, former Vice-President of the International Association of Esperantist Lawyers, entitled "The International Language is Ready for International Law".

A reader, Phillip Hamilton, questioned Mr. Harry's thesis, but he was defended by Mr. Justice K. Enderby of the N.S.W. Supreme Court, who made the following points:

"In the Middle Ages, Latin fulfilled a similar purpose to that offered by Esperanto today.

Like Latin, Esperanto offers an advantage that the national languages cannot offer. It is neutral.

I agree with Mr. Hamilton that one meets English almost anywhere in the world, and that to some extent, it has become a second language in some countries, but this is not necessarily a good thing nor is it enough.

English has not achieved pre-eminence because of any inherent advantage over other national languages. It has done so as a result of a cultural and social dominance of English speaking peoples over these last two or three hundred years or so.

Diplomacy, international law and cultural exchange, require something better as a medium of communication. They require a language that is equal and neutral.

One has only to deal in English face to face with people whose first language

is not English to appreciate the advantage one has and the unfairness of the exercise.

May I dispute a few other points that Mr. Hamilton makes.

He says that Esperanto has no literature. This is not true although he may not have read any.

Esperanto has a flourishing original literature, apart from its many translations. It exceeds that of many small nations and it is growing.

Esperanto is completely logical and easy to learn. It is pleasant to the eye and the ear and sophisticated and precise. It is estimated to take about a fifth of the time to learn as, say, to learn French. If one applied that test to the more difficult languages, the advantage is much greater.

There is a growing Esperanto movement in China, the countries of Eastern Europe, some of the smaller "one off" language countries, Brazil and Japan.

The Peoples Republic of China for example, publishes literature both translated and original of high quality and encourages it to be taught as a second language in many of its schools and universities.

There are full-time schools in Bulgaria and France and China that I know of and occasional schools in almost every other country in the world.

I correspond with Esperantists in several countries by way of what is a common second language. That would be impossible without Esperanto.

Overseas, a number of professions have Esperanto associations which have international meetings. Law is only one.

To sum it up, Esperanto is an attempt to do away with the divisive aspect of national languages and make the place a better world in which to live. That must serve the aim of International Law. It took our metric system 200 years to be accepted in Australia. How long will it take Esperanto.

I commend it to anyone interested in communicating and exchanging ideas. If nothing else it is a fascinating hobby.



• **PERTO:** Ni perdis fidelan membron en **Jack Hawks**; Jack subite mortis, frapita de koratako. Tio okazis apud Kalbarri, cent kilometrojn norde de Geraldton, dum Jack estis jam survoje al nia venonta kongreso en Brisbano. Jack mankas al ni kiel forta laboranto kaj tre simpatia samideano. Pro siaj multaj vojaĝoj li estis bone konata en-kaj ekster Aŭstralio. Proksimume 20 Esperantistoj ĉeestis la kremacion. Mi plenumis la tristan sed honorigan taskon eldiri la funebran paroladon.

Pli bona novaĵo estas, ke S-ino J. Einihovici, kiu pasigis mallongan tempon en hospitalo, jam resaniĝis.

La vendred-matenaj klasoj okazas jam dum kelkaj monatoj en la luksa apartamento de S-ino Dorothy Threlfall. Dorothy, samkiel ŝia fratino S-ino Elaine Pianta, donacis \$1000 al nia domfonduso. Mi dankas, ankaŭ flanke de ĉiuj aliaj liganoj, al ambaŭ fervoraj subtenantoj pro ilia malavarega donaco.

Liganoj vendis biletojn por koncerto kaj teatraĵo. Ni aĉetis pogrande kaj vendis podetale. Dank' al samideano Len Eddington, kiu faris multe de la prepara laboro, tiu agado kreskigis nian fonduson.

Krom kolekti ladskatolojn, ĵurnalojn, botelojn, ni vendis biletojn en loterio; estas Vera Payne, kiu estas la centro kaj la motoro de tiuj kaj aliaj aktivecoj.

Dimanĉon, la 24-an de julio, 30 Esperantistoj kunvenis en la domo de Vera Payne por tie ĝui lunĉon. Ĉiuj ĝuis la kuneston kaj samtempe, dank' al Ges-roj Payne, kiuj organizis la aferon, la lunĉo dikigis nin kaj la fonduson per preskaŭ \$300. Ĉe la lunĉo Patro Kristnasko regalis ĉiujn per donaco. Laŭ aspekto kaj konduto Patro Kristnasko estis la vera Patro mem, alie mi iomete suspektis ke estas s-ano Len Eddington.

—RENE SMEETS.

ADRIENNE PALING (1901 — 1988)

Adrienne Paling naskiĝis en Bruselo en la jaro 1901. La Patro estis aŭstraliano kaj la patrino estis germana. La familio haste vojaĝis al Britio en 1914, kaj post la mondmilito, ili venis al Aŭstralio.

Adrienne fariĝis tre kompetenta kaj populara instruistino de la franca kaj germana lingvoj. Dum la 1950-aj jaroj ŝi aliĝis al la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj) kaj en 1959 ŝi ĉeestis Esperanto-grupon en "Malvern", Melburno, fonditan de Ralph Harry. Post du jaroj ŝi iĝis la gvidantino de la grupo, ĝis 1985, kiam pro malsano ŝi ne plu povis daŭrigi. Tamen, Adrienne tre regule ĉeestis kaj partoprenis la kunvenojn de la "Malvern"-Esperanto-grupo ĝis sia morto je la 28-a de aprilo, 1988. Ŝi ankaŭ subtenis la Esperanto-Federacion de Viktorio kaj la Aŭstralian Esperanto-Asocion; krome ŝi estis membro de la Kvakera Esperantista Societo.

Adrienne edziniĝis al Harold Paling en 1962, kaj ili vivis feliĉe ĝis la morto de Harold en 1981.

Adrienne interesiĝis pri homoj, speciale pri infanoj, kaj ankaŭ pri bestoj kaj birdoj. Ŝi ĉiam montris internan pacon, amon kaj ĝojon, eĉ dum periodoj de granda streĉiĝo, kaj ŝia humoro estis ĉiam afabla. Ĉiu, kiu konis ŝin, respektis kaj amis ŝin. Adrienne Paling restos bona inspiro al ni ĉiuj.

—DON PESCOD.

• **SIDNEJO:** La 4-an de julio Tom Elliott distris nin per sia parolado, kiu vagis tra kelkaj temoj. Li denove tuŝis la problemon de ĝusta nomo por la "komputero / komputilo". Semajnon poste, vizitanto el Hungario, kiu nun loĝas en Sidnejo, parolis pri siaj spertoj post la tempo kiam li kaj lia familio decidis forlasi la propran landon. Li kaŝe forigis ĉion eblan, kaj "feriis" en Aŭstrio. Tie ili sin prezentis al diversaj konsulejoj kaj fine estis akceptitaj de la aŭstraliaj aŭtoritatoj.

Je 18-a de julio ni bonvenigis alian vizitanton, S-inon Else kaj ŝiajn edzon

kaj bebon. Poste, ges-roj Fatarelo, novuloj, parolis: Maria pri ferio en norda Kvinslando, kaj Romano prezentis poemeton, kiun li verkis. Semajnon poste estis vespero de legado el diversaj ĵurnaloj. Denove "Monato" estis grava helpilo, ankaŭ la ĵurnalo el Koreo interesiĝis nin. —M. CHALDECOTT.

Grandaj Lingvoj

La revuo de la itala flugkompanio ALITALIA publikigis intervjuon kun la ĝenerala sekretario de la Unuigintaj Nacioj en kiu Javier Perez de Cueller sciigis interesajn ciferojn pri la nombroj de la denaskaj parolantoj de grandaj lingvoj.

Ciferoj estas en milionoj:

ĉina	788
angla	420
hinda	300
hispana	296
rusa	285
araba	177
bengala	171
portugala	164
malaj-indonezia	128
japana	122
germana	118
franca	114

—Sinjoro Direktoro! Mia edzino forlasos min, se mi ne ricevos salajroaltigon.

—Do, vi bezonas altigon?

—Male! Mi eĉ petegas: bonvolu doni nenian altigon al mi!

—Gratulon, amiko! Hieraŭ mi vidis vin en la kafejo, ho, kiel ĉarmega estas via filino!

—Nu, jes, Tamen bonvolu ne menci tion al mia edzino!

—Pardonon, sinjoro, ĉu via hundo eble mordas?

—Tute ne. vi povas trankvile enveni en la domon.

—Dankon . . . prefere iunokte, kiam vi ne estas hejme . . . (Hung. Vivo)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$25
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$15.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 251 (331)

MELBURNO

Septembro-Oktobro, 1988

LA 4-A PACIFIKA KAJ LA 26-A AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESOJ EN BRISBANO

11-a — 20-a de septembro, 1988

Ekde 1950 kongresoj en Aŭstralio ĉiam okazis en januaro, sed grandaj diferencoj estis elstaraj trajtoj de la ĵus pasintaj. La Brisbana Organiza Komitato decidis aranĝi la kongresojn en septembro, ĉar tiam la kvinlanda varmego kutime estas malpli severa ol en januaro. Samtempe la ducentjara jubileo de Aŭstralio estus plej taŭga por prezenti Aŭstralion al eksterlandaj vizitantoj. Krome la granda Mondekspozicio, por marki tiun historian eventon, estus plia allogilo.

Ke la kongresa komitato ĝuste elektis pruvis la fakto, ke 205 personoj aliĝis al la kongreso, inter ili 26 Japanoj, 24 Nov-Zelandoj, 7 Ĉinoj kaj Usonanoj. Tri esperantistoj venis el Belgio, po du el Venezuelo, Kanado kaj Britio.

Ĉe impona nova flughaveno kongreskomitatanoj bonvenige atendis la alflugintojn kaj poste per aŭtomobiloj veturigis ilin al la kongresejo, la Kolegio de Plua (Triagrada) Eduko en la suda antaŭurbo Mount Gravatt. La Kolegio situas sur monteto en bela natura kampareca ĉirkaŭaĵo, kie la loĝantoj vekigis je la gajiga sono, kvazaŭ ridado, de la

aŭstralia birdo Kukaburo, speco de alciono.

Tie kolektiĝis aro da transmaraj vizitantoj. Inter ili troviĝis UEA-Vic-Prezidanto Yosimi Umeda, kiu gvidis grandan karavanon da japanoj. El Caracas, Venezuelo, venis Profesoro Juan Bachrich kun sia hungardevena edzino Maria. Li estas profesoro de fremdaj lingvoj kaj Ĝenerala Sekretario de la Venezuelana Esperanto-Asocio. Plezure ni povis denove saluti S-inon Elfriede Ernst el Bruselo, kiu partoprenis la unuan Pacifikan Kongreson en Melburno, 1976, kaj tiel ŝatis ĝin, ke denove ŝi entreprenis la longan kaj lacigan flugvojaĝon al Aŭstralio.

Plua kaŭzo por ĝojo estis revido de Josefo Major, la redaktoro de "Nov-Zelanda Esperantisto", kiel ankaŭ Doktoro Don Rogers, kiu vidigis inter aŭstraliaj Esperanto-grupoj dum pli fruaj jaroj da specialaj studoj en Aŭstralio.

La **Oficiala Inaŭguro** okazis en la granda Teatro de la Kolegio, je lundo, 12-a de septembro.

Post kantado de "La Espero", A.E.A. Prezidanto Ralph Harry bonvenigis la ĉeestantojn. Sekvis la salutoj de la Federacioj de Nova Sud-Kimrujo (Betty Cleminson) kaj de Viktorio (Ruth Tuman). Nome de la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo salutis Vera Payne. Stan Bruton parolis nome de la nove fondita Esperanto-Societo de Devonport, Tasmanio. Por Kanbera Esperanto-Klubo salutis Marj. Ellyard, Max Wearing por Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo, Ray Ross por la Esperanto-Federacio de Kvinslando. Reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo nun transdonis videobendon donace al A.E.A. kaj insignon por ĉiu kongresano kaj invitis ĉiujn al la 5-a Pacifika Esperanto-Kongreso en 1992. S-ro Takasi Chara salutis nome de la Japana Esperanto-Instituto kaj donace transdonis librojn. Salutis ankaŭ William Vathis (Spokane, Washington) kaj S-ro E. Woodruff (Vancouver, Kanado).

Aliaj en la longa vico da salutintoj estis S-ino Cathy Schulze, nome de la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko, S-ro John Abood (Lae, Nov-Gvineo) por la Baha'i Movado, D-ro Paul Friedman (Nov-Zelanda Esperanto-Asocio), Elfriede Ernst, Bruselo, nome de la Belga Esperanto-Federacio, S-ino Karolina Gilmore (Brighton, Britio), Petro de Smedt, nome de la Flandra Esperanto-Ligo kaj la gazeto "Monato", Karl Renschler, nome de la Germana Esperanto-Asocio.

La "Himno de la Junularo" kaj aliaj Esperanto-Kantoj fare de la 25-junula foro (lernejoj el Gaton) provizis agrablan interludon antaŭ ol parolis la Honorgasto Senatoro Michael Macklin de la Aŭstralia Demokratia Partio. (Vidu la tekston de lia anglalingva parolado aliloke.)

Tuj poste Brisbana foro kantis la himnon "Antaŭen Aŭstrali".

Yosimi Umeda nun ekstaris dirante ke li parolas "Ne kiel gasto, sed kiel kunlaboranto". Li transdonis la "Premion Onisaburo Deguci" (4000 nederlandajn guldenojn, Pupon kaj Diplomon) al Ralph Harry, pro ties meritoj por la Esperanto-movado. S-ro Ralph Harry en sia dankparolado diris, ke 2000 guldenojn li donacos por junuloj en la Pacifika Regiono kaj 2000 guldenojn al la Einihovici-Fonduso por ebligi vojaĝadon de junuloj al Esperanto-kongreso.

LABOR — KUNSIDOJ

Okazis du Labor-Kunsidoj je la 12-a kaj 14-a de septembro, sub la prezido de S-ro Ralph Harry. Li proponis, ke la ĉeestantoj akceptu, kiel aprobitan protokolon, la raporton en "The Australian Esperantist" de Januaro/Februaro, 1986. (Unuanime akceptita). Li raportis, ke AEA iomete malkreskis, ke kvankam estas en Aŭstralio proks. 600 Esperantistoj, nur proks. 300 estas membroj de A.E.A. Novaj grupoj fondiĝis en Taree, Foster, Devonport kaj Hobarto. La Registaro donis stipendion de \$1000 al A.E.A., kiu estis uzita por ebligi la viziton al Aŭstralio de UEA-Vic-Prezidanto Yosimi Umeda. S-ro Harry faris referaĵojn al konferenco de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj. A.E.A. donis stipendiojn al Esperanto-kurso en Gaton, al Tasmaniano por viziti Japanion kaj al Kanberano por partopreni la TEJO-Kongreson en Jugoslavio.

El la Jubilea Fonduso AEA eldonis la Historion "Esperanto en Aŭstralio" kaj la broŝuron "Esperanto, the language whose time has come" kaj la Specialan Eldonon de "The Australian Esperantist". Li raportis, ke AEA ricevis nur unu heredadon. S-ro Harry proponis, ke ni membriĝu Rotarianojn kaj membrojn de la UNO-organizo. Li petis, ke membroj partoprenu en la eldono de Angla-Esperanto-Vortaro, al kiu ni ricevis inviton el Usono.

S-ino Betty Cleminson raportis pri la "Korespondpeta Servo". Ŝi ricevis multajn korespondpetojn, sed ŝi ne havas junulojn por plenumi tiujn petojn.

S-ino Marj Ellyard raportis, ke multaj ekzamenitoj ne estas membroj de AEA. S-ro Harry proponis, ke ne-membroj pagu \$20 pli por ekzamenoj ol AEA-membroj devas pagi.

(Vidu ankaŭ la Rezoluciojn de la Kongreso aliloke.)

Tom Elliott raportis pri la **Libro-Servo**, kiun li nun estras ek de 1971. Li dankis la ŝtatajn Libro-Perantojn pro ties fidela kunlaboro. Li raportis, ke la Libro-Servo ne bezonas financon subtenon, ĉar ĝi "staras sur propraj piedoj". La valoro de la stoko estis en junio 1988 \$18.000, el kiu la duono lokiĝas en Sidnejo kaj la alia duono troviĝas ĉe la diversaj ŝtataj libro-perantoj.

S-ro Harry gratulis al Tom Elliott pro la sukcesa gvidado de tiu gravega servo.

La Kasisto, S-ro O. Loneragan raportis, ke ĉiu numero de "The Australian Esperantist" kostas proks. \$550. S-ro Arthur Cocking proponis, ke ni malaltigu la kostojn de la asocia organo.

S-ro Alan Towsey raportis, ke la "AŬSTRALIA ANTOLOGIO" estis lanĉita dum la Universala Kongreso en Roterdamo. Li dankis al S-ro Ralph Harry pro ties multaj penoj por intertrakti kun eldonistoj.

Pri **Ekspozicioj** raportis Komisiito Gerald Tumman. Li raportis, ke 18 Ekspozicioj okazis en Viktorio kaj li dankis al Len Eddington (Perth) pro la 7 ekspozicio, kiujn li aranĝis en Okcidenta Aŭstralio.

S-ro S. Kanaĉki (Melburno) raportis, ke li estas en daŭra kontakto kun transmaraj **Radio-Stacioj** kaj alvokis membron por ties same. Oni sendu almenaŭ unu raporton jare al ĉiu Radio-Stacio.

S-ro Max Wearing, Komisiito por **Instrumaterialoj** proponis, ke AEA disponigu \$500 por la venonta somerlernejo kaj komisiu iun personon kompili lernilaron por uzo en speciala ĉambro en kiu troviĝus luprenita komputero, kelkaj sonbendiloj kaj preparitaj kasedoj kun bone surbendigitaj rakontoj kaj aliaj verkaĵoj. Li proponis, ke tia lernejo restu malfermita dum unu aŭ du horoj ĉiutage en tutlandaj somerlernejoj.

Vigla diskuto okazis pri la novaj kotizoj. La "galopanta" inflacio necesigis nepran altigon de la kotizoj kaj restis nur unu/du ĉeestantoj, kiuj argumentis pri malgranda altigo de familia kotizo, je kio Prof. Robbi Robertson prave rimarkis, ke "ni argumentas pri nenio". La kongreso fine akceptis proponon de Ray Ross, ke la kotizo estu \$25, tiu por **Familioj \$30**, kaj por **Pensiuoj** kaj **Junuloj** estu minimume \$15. Ankaŭ oni akceptis proponon de Les Scott, ke **Sub'erantoj** pagu **duoblan kotizon**.

Sekvis nun la **Elektioj** de la nova Estraro. Antaŭ la kongreso estis la problemo, ke la Prezidanto (Ralph Harry), la Sekretario (Marj Ellyard) kaj la Redaktoro (Herbert Koppel) deziris

emeritiĝi. S-ro Ray Ross proponis Trevor Steele kiel Prezidanton. Li ankaŭ proponis Jugiston Kep Enderby kiel Vic-Prezidanton kaj deklaris sin preta akcepti la postenon de Sekretario. Tiujn proponojn la ĉeestantoj akceptis unuanime kaj oni elektis la sekvantan Estraron:

Prezidanto: S-ro Trevor Steele (Brisbane).

Vic-Prezidantoj: Jugisto Kep Enderby (Sydney) kaj S-ino Vera Payne (Perth).

Sekretario: S-ro Ray Ross (Brisbane).

Help-Sekretario: S-ro Herbert Koppel (Melbourne).

Kasisto: S-ro Owen Loneragan (Perth).

Redaktoro: vakas, sed la estraro decidis inviti S-ron Donald Broadribb (Perth) akcepti tiun gravan postenon.

Ĉef-Ekzamenisto: S-ro Trevor Steele (Brisbane).

Sekretario de la Ekzamena Komisiono: S-ino Marj Ellyard (Canberra).

A.E.A. Biblioteko: S-ro Ralph Harry (Canberra).

Korespondaj Kursoj: S-ro John Moore (Emu Park).

Korespondpetoj: S-ino B. Cleminson (Manly).

Libro-Servo: S-ro Tom Elliott (Sydney).

U.E.A. Komitato: S-ro Les Scott (Manly).

Ekspozicioj: Ges-roj G. Tumman (Melbourne).

Konsilantoj por Instruistoj: S-inoj Vera Payne, Shirley Gradussov (Perth).

Komisiito por Instruistoj: S-ro Max Wearing (Adelaide).

Loko de la venonta Kongreso: Ray Ross proponis Melburnon kaj Jack Fallu proponis Sidnejon kiel lokon de la venonta kongreso, sed ambaŭ urboj NE volis akcepti la proponojn. Fine oni akceptis proponon de Ralph Harry, ke, se ne estos invito de alia urbo ĝis la fino de 1988, A.E.A. invitu la Esperanto-Federacion de Viktorio organizi la kongreson en 1990.

Okazis kelkaj **FAKKUNSIDOJ**, sed bedaŭrinde organizintoj ne helpis la redaktoron per raportoj. La U.E.A.-Fakkunvenon gvidis Yosimi Umeda kaj tiun de S.A.T. prezidis Bill Clarke (Perto). Yosimi Umeda kaj S-ino Karolina Gilmore el Brighton, Anglujo, instigis al partopreno en la 74-a Universala Kongreso en Brighton. SAT-anoj diskutis la nunan ekonomian kaj politikan situacion en la mondo.

RADIO-AMATOROJ, ses japanoj kaj 2 aŭstralianoj (Tom Elliott, Sidnejo, kaj Errol Chick, Melburno) kunvenis ĉiutage dum la kongreso.

Antaŭe ili ofte parolis per radio unu al la aliaj, sed la Kongreso provizis unuan tojon kaj unikan okazon por persona renkontiĝo. Iliaj kunvenoj konsistis grandparte el ĝeneralaj diskutoj pri komunikado; tamen ĉiumatene ili komunikigis per radio kun aliaj radioamatoroj en Japanio kaj Nov-Zelando kaj interŝanĝis novaĵojn.

Por la **Dramo-** kaj **Kant-Trofeo** prezentis sin nur unu konkursanta grupo, la ĉiam vigla Brisbana Societo. La teatraĵo "Ribeiro en la ĉielo" amuzis la ĉeestantojn tiom, kiom ravis la kantado de la sama grupo, ĉarme vestita en la kutimaj blankaj kaj verdaj kostumoj.

Okazis kelkaj bone organizitaj ekskursoj: Tra Brisbano (je 12-a de septembro), al "Songomondo" kaj "Ora Marbordo" (ambaŭ je 14-a de septembro), al la "Sunbrila Marbordo" (je 17-a de septembro) kaj al Toowoomba (je 19-a de septembro). Postkongrese (de la 20-a ĝis la 23-a de septembro), spite de la alta kosto (\$300), plena aŭtobuso vizitis "Bundaberg" kaj la Koralrifon. La unuan nokton, la kongresanoj paŭzis en la "Bert Hinkler Motor Inn", nomita laŭ la fama aviadisto, kiu naskiĝis en "Bundaberg". Sekvantan tagon la grupo lunciĝis en la "Bert Hinkler"-rozĝardeno kaj inspektis la muzeon, kiu nun troviĝas en la duetaĝa dometo de la fama aviadisto. Samtage la grupo vizitis rum-distilejon kaj fabrikojn de fruktovino kaj bareloj, kaj sukerkanplantejojn. Je la tria tago la ekskursantoj ĝuis la belan veteron per inspekto de la koralrifoj kaj fiŝoj kaj havis la eblecon naĝi. Vespere ili havis la oportunon vidi la bruligon de sukerkan-kampo. Ĉiuj konsentis, ke spite de la alta prezo, tiu postkongresa ekskurso donis al ĉiuj altvaloran kompenson kaj fariĝis inda fino al sukcesa kongreso.

"**La situacio de Esperanto en unuopaj landoj**" estis la temo de kunveno je la 14-a de septembro. S-ro Umeda raportis, ke la anela lingvo estas vere nur "papera" lingvo en Japanio. Esperanto bone progresas kaj la Japana Esperanto-Instituto havas 1500 membrojn. Ankaŭ ekzistas pluraj "Distriktaj Ligoj", kiuj havas inter 10000 kaj 30000 anojn. Krome, ekzistas Studentaj Esperanto-Klubo en 70 Universitatoj.

Reprezentanto de la Ĉina Esperanto-Ligo raportis, ke oni instruas Esperanton en 71 Universitatoj kaj ke la Ligo klopodas akiri subtenon de sia registaro.

Cathy Schulze de la Esperanto-Ligo de Norda Ameriko raportis, ke bona lernolibro eldoniĝis ĉi-jare kaj ke granda grupo aktivis en Idaho. Plej elstarajn sukcesojn alportas la ĉiu-jaraj kursoj ĉe la San-Franciska Universitato. Gazetartikoloj multe helpas, dum prelegoj, ĉe la Radio kaj Televido ne alportis multe da novaj membroj.

S-ro E. Woodruff el Vankuvero raportis, ke la grandeco de Kanado malfaciligas la laboron de la Esperantistoj. Profesoro Juan Bachrich el Caracas raportis, ke Esperanto nur tre malrapide progresas en Venezuelo. Ekzistas eble 100 Esperantistoj en la lando, el kiuj eble nur dek estas vere aktivaj.

Ekparolis nun la juna, tre aktiva D-ro Paul Friedman el Hamilton, Nov-Zelando. Li raportis, ke la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio estas sufiĉe bonhava. Ĝi havas proks. 150 membrojn, sed ekzistas nur 4 aktivaj grupoj en la lando. La venonta Kongreso okazos inter la 6-a kaj 9-a de januaro, 1989 ĉe la Hamiltona Universitato kaj li invitis aŭstralianojn al partopreno. Mankas junuloj kaj oni serĉas aktivan organizanton por la Libro-Servo. Li esperas pri pli intima kunlaboro kun A.E.A.

S-ro Umeda raportis, ke U.E.A. tre baldaŭ havos tre okulfrapan ekspozicion, kiun lokaj kluboj povos prunti, kondiĉe ke ili pagu la konsiderindan poŝtkoston.

S-ro John Abood raportis, ke ekzistas grupeto en "Port Moresby" kaj izoluloj interesiĝas en Lae kaj Rabaul. Petro de Smedt donis raporton pri la movado en Belgio. La ĉiam vigla kaj bonhumora Karl Renschler ĝiseble reklamis la cent-jaran jubileon de la Nuernberga Esperanto-Societo, la unua en la historio de Esperanto.

Fine reprezentanto de la Esperanto-Societo de Qingdao invitis la 5-an Pacifikan Esperanto-Kongreson por 1992. Li proponis, ke tiu Kongreso havu la devizon "Esperanto kiel ponto inter Oriento kaj Okcidento".

Okazis kelkaj distraj-vesperoj. Je la 15-a de septembro, okazis la "Aŭstralia Vespero". Brisbananoj prezentis scenojn el la ducent-jara historio de Aŭstralio. S-ino Greenhalgh legis aŭstralian poemon e' la "Aŭstralia Antologio". Elstare, kiel

kutime, estis la prezentado de D-ro Ross Robins. Ross estis A.E.A.-Prezidanto en 1962/63 kaj nun loĝas apud Brisbano. Kelkfoje, dum kongresoj, li montris magian talenton. Dum 40 minutoj li distris la ĉeestantojn per siaj magiaĵoj, kaj li rikoltis merititan aplaudon. Erisbana kvarteto majstre kantis, Jean Lehane legis el la "Aŭstralia Antologio" kaj Isabel Gale distris per stilofon-prezentado.

Dum aliaj vesperoj Perto de Smedt distris nin per amuzaj prelegoj. Robbie Robertson montris diapozitivojn pri partopreno en la UEA-Kongreso en Rejkjavik kaj Karl Renschler montris diapozitivojn pri renkontiĝoj kun diverslandaj esperantistoj. Vere Payne prelegis pri la indonezia lingvo kaj pruvis, ke Claude Piron malpravus, kiam li laŭdis la facilecon de la indonezia lingvo. Tri nov-zelandoj prelegis pri diversaj temoj: Jozefo Mayor parolis pri Esperantologio, Don Rogers pri la uzo de modernaj aparatoj por antaŭenigi Esperanton kaj D-ro Friedman pri la temo "Komprene kaj komprenigi". Malfeliĉe mankas spaco por represi tiujn lertajn prelegojn. La japanoj prezentis sian te-ceremonion kaj montris kiel vesti sin per kimono kaj "obi"; ili ankaŭ kantis japane.

EKUMENAN DISERVON gvidis Brigadestrino Isabel Gale. Peter Keates (Nov-Zelando) malfermis la servon kaj, krom Isabel Gale, legis John Abood kaj John McLeod el Baha'aj tekstoj.

Lunde vespere (19-a de septembro) okazis la **BANKEDO** kaj la **FERMO** de la Kongreso. La nova Prezidanto, Trevor Steele, gvidis la programon kaj proponis toston al Zamenhof kaj la Lokan Kongresan Komitaton. Kongresanoj sidigis ĉe feste preparitaj tabloj kaj ilin taŭge regalas la kuirejaj stabanoj.

Pluajn devojn plenumis la nova Prezidanto, kiam li transdonis **AEA-Honorinsignojn** al Fay Koppel kaj Ray Ross, pro ties laboroj por Esperanto dum multaj jaroj. Fine S-ro Herbert Koppel prezentis la Dramo-Trofeon al Gaye Phillips kaj la Kant-Trofeon al Kay Andersen.

GRATULA MESAĜO

Al la 4-a Pacifika Kongreso de Esperanto kaj la 26-a Kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio

Karaj Kongresanoj,

Solene inaŭguriĝas la 4-a Pacifika Kongreso de Esperanto kaj la 26-a Kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio

dum la vigla disvolvigo de la Esperantomovado en la tuta mondo. Ni esprimas varmajn gratulojn kaj deziras plenajn sukcesojn al ambaŭ kongresoj.

La du kongresoj estas grandioza kolektigo de esperantistoj de la azia kaj pacifika regionoj. Ni kredas, ke ambaŭ kongresoj certe faros aktivan kontribuon por plifortigi la unuigon inter diverslandaj esperantistoj de Azio kaj pacifika regiono, pli bone diskonigi kaj plivastigi Esperanton, profundigi la amikecon kaj interkomprenigon de diverslandaj popoloj kaj defendi la pacon en Azio kaj pacifika regiono kaj en la mondo. Ni kredas, ke dank' al la senlaca penado de esperantistoj, Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la tuta homaro. Ni atendas la alvenon de tiu tago.

Kun koraj salutoj,

Esperanto-Asocio de Qindao, Ĉinio.

ĜOJPLENA ESPERANTO — TRAVIVAĜO

Les Scott

Oni volas diri, ke la ĵus pasinta 26-a A.E.A. — kun 4-a Pacifika Esperanto-kongreso estis unu el la plej ĝuidaj enlandaj kiujn mi partoprenis ĝis nun.

La loko, la Brisbana C.A.E., estas pitoreska kaj ĝia natura ĉirkaŭaĵo tre plaĉis al ĉiuj — taŭga por ripozo kaj malstreĉigo. La "Haloj de Loĝado" kvankam ne luksaj, certe estas adekvataj kaj komfortaj. La litcambroj, la koridoroj, ripozlokoj kaj lavcambroj-necesejoj estis ĉiam puraj kaj la laboro de la servantinoj estis unuaklasa, eĉ dum la semajnfino.

La manĝoj estis variaj kaj laŭ la gusto de ĉiuj — eĉ la kutimaj plendmuloj restis silentaj. La Bankedo elstaris. La ge-servistoj ĉiam sin pruvus agrablaj kaj helpemaj.

Mankis sufiĉa spaco en la rondoma Kongresejo dum popularaj kunsidoj kaj amuzaj vesperoj, sed, spite tion, preskaŭ ĉiuj povis sidi kaj neniu grumbliis. Snerta eks-Prezidanto Ralph Harry prezidis dum la formalaj kunsidoj kaj tiuj progresis glate, sen argumento. Eĉ la elekto de la nova Estraro kaj Komisionoj ne kaŭzis problemojn, pro la apero de novaj volontuloj kaj la daŭra konsento de aliaj por la diversaj gravaj postenoj. Oni rimarkis, ke la A.E.A.-Kasisto Owen Loneragan estis tre aktiva dum la tuta kongreso — tre efika funkciulo por la financoj de la Asocio. Oni devas mencii la elstaran, senlacan laboron de Tom

Elliott kun la helpo de edzino Mavis kaj kelkaj aliaj, en la Libro-Servo (la vendoj preskaŭ atingis la altan buĝeton, kiun Tom starigis). Oni ne povas forgesi la grandan kontribuon de John Moore, la estro de la Korespondkurso Servo dum la jaroj — vere mirinda kaj gratulinda servo, kiu atingis tiun grandan rezulton. Kaj Herbert Koppel kaj lia gazeto "The Australian Esperantist", kie estus la Movado sen lia senlaca kaj sperta laboro? Kaj Fay Koppel kaj Trevor Steele rilate la Ekzamenojn? Kaj Ralph, pro lia elstara laboro dum la jaroj — kaj Alan Towsey, Aŭstralia Esperantologo. Kie oni haltas? Kia grandega teamo!

Revenante al la Kongreso mem — la antaŭplanado kaj la klopodoj de la L.K.K. sub la gvidaj manoj de Ray Ross estis preter la imago. La tuta grupo agis kiel bone oleita maŝino. La efika kaj precize organizita kaj efektiva laboro certe meritis la sukceson atingitan. La komplika tasko de la registrado funkciis glate, sen evidentaj problemoj. Nesolveblajn problemojn oni tute ne rimarkis. Tie oni vidis krom Ray Ross, Mina Sporck, Merv Schramm, Peggy Ross, Cathy Sullivan, Decia Shonhan, Lillian, ktp. — flanke oni rimarkis Gaye Phillips, Kay Anderson, Gilbert Shonhan, ktp. — ĉiam pretaj por doni diversflankan personan helpon kaj artan distraĵon dum vesperaj programoj.

Amuzaj vesperoj estis en la spertaj manoj de tiu fama paro Gaye Phillips kaj Kay Andersen. Ili eĉ superis siajn antaŭajn prezentadojn kaj ilia reputacio en tiuj roloj plue kreskis. Neniu el la kongresaj ĉeestintoj volonte maltrafis eĉ unu programon, kaj ĉiuj estis feliĉaj! Dedaŭrinde, cirkonstancoj ne permesis konkurson por la kantado kaj dramo, sed Brisbanaj grupoj estis bonegaj. Trevor, ĉiam profesie regisoris. Herbert kaj Ray helpis.

Veturigado de la partoprenantoj al iu ajn loko estis vere rimarkinda, pere de la helpo de Tom O'Grady, Stan, Ray, Gaye, Gilbert kaj multaj aliaj. Tiu volontula servo multe kontribuis al la persona komforto de ĉiuj.

Kongresaj ekskursoj estis bone aranĝitaj kaj ĉiĉeronoj Tom kaj Trevor, kiuj tutevidente antaŭe esploris la vojojn, lokojn, vidindaĵojn, provizis interesplenaĵojn kaj komentariojn. La plenaryo daŭris personoj, kiuj partoprenis en la Post kongresa Ekskurso al Bundaberg ŝajne estis

tute feliĉaj kaj laŭdemaj pri la aranĝoj. Oni aplaudis Ruth Morrison pro ŝiaj klopodoj dum tiu.

La ĉeesto de multaj eksterlandanoj aldonis grandan koloron kaj etoson ĉie — en la kongresejo, en la mangsalono, en la koridoroj, dum programoj kaj ekskursoj. Generale oni devis rimarki la fratecan kuneston inter la ĉeestintoj — ĉiuj babiladis senĉese, ĉie!

"Expo" kompreneble prezentis varieton kaj spicon al nia restado.

Kaj vere — al kiuj ni ŝuldas nian ĝojplenan travivaĵon? Al Ray kaj lia bando da L.K.K.-anoj. De kiam Brisbano estos elektita por konduki la 1996-ajn Olimpiajn Ludojn, ni ĉiuj voĉdonos, ke ili iĝu parto de tiu grava komitato!

Finfine — nia tosto al la nova Prezidanto Trevor Steele kaj lia teamo por nia baldaŭa esperanta estonteco en Aŭstralio! Gis . . .

OPENING ADDRESS

to the

26th Australian Esperanto Congress

and the

4th Pacific Esperanto Congress

by

Senator Michael Macklin, Deputy Leader

Australian Democrats

Mt. Gravatt C.A.E.

12th of September, 1988

Tolstoy said: "I am more and more busy, and I have less and less time. For that reason, despite the fact that I fully support the spread of the international language Esperanto, I have not time to dedicate to it."

Sadly, I rather suspect that this is the case with many people today — it certainly is with me.

And yet, ironically, Esperanto offers part of the solution to coping with such time pressures: it offers us the means to communicate directly and successfully across national borders — it eliminates expensive duplication.

The theme of this Congress, "Esperanto for the Youth of the World" focusses our attention on what the world of the late twentieth century has to offer young people and also what may have to be done for them to survive.

It may be that the present structures of the world will have to be transformed. We live in a world of unprecedented inequity. Abject poverty, hunger and disease co-exist with abundant wealth and luxury.

The theory, until lately, has been that poverty will be eradicated as the economy grows stronger, that money has a way of 'trickling down', and if the rich get richer, the poor in turn will become less and less poor.

Nothing could be further from the truth — in fact wealth creates wealth at the expense of those already impoverished. What is required is a new world economic arrangement whose goals would be a radical redistribution of wealth and power — we may get to this point willingly or we may be taken there against our will.

The world just does not have the resources to sustain the arms race. As Gandhi said: "The world has enough for our needs but not for our greed. Tension levels will not have to rise much further in one of a dozen trouble spots before some sort of nuclear exchange could change the way the world functions for generations to come.

We obviously need to replace national rivalries with global co-operation. This is where Esperanto has an important role to play. Esperanto provides humanity with a neutral, living, international language; it crosses national borders, it can increase a sense of global solidarity because it belongs to no nation or party.

Gathered here today from many parts of Australia and the Pacific you all bear testimony to the fact that Esperanto breaks down the language barrier which is one of the greatest obstacles to international understanding. It is a powerful aid to world friendship.

I turn again to the theme "Esperanto for the Youth of the World". I enjoyed the Children's Choir immensely, and I note the fact that 'Our Lady of Good Counsel' Primary School in Gatton is the only school in Australia where Esperanto is part of the school curriculum. Schools are obviously the ideal place to introduce the international language. Indeed, when the Democrats' Education policy was formulated in 1977, the teaching of Esperanto was recommended.

The advantages of empowering people to communicate with the whole world are obvious. One that appeals to me is the facilitation of travel and the subsequent benefits this brings both to the individual and to the world. When people travel they become more aware of the common humanity which unites them

rather than the differences which separate them.

When people from many different nations spend time together and use a common, neutral language national differences cease to be a source of miscomprehension and fear; they are seen as a precious and accessible expression of human variety. Persons of another native language take on recognizable human faces, they are people with whom it is possible to discuss solutions to common problems.

In fact, Esperanto is a symbol of communication directly between equals whose interests have passed from the parochial to the universal. This, of course, makes an immense contribution to the internationalisation of the world.

Equally obvious are the factors that have worked against the rapid adoption of Esperanto: teachers of foreign languages may well see a real clash between the role of Esperanto and the teaching of national languages; it has been ignored by international business.

A regime based essentially on inequality of access to language dominates the international scene, and for the most part the governments and peoples of the world accept the principle that some people's languages are more useful than others in international affairs and that some nations will always be disadvantaged.

How encouraging it is then to note that Esperanto is now formally recognised by UNESCO and that the United Nations now publishes some documents in it; and is a strong contender to be adopted by the EEC as the bridge language for computer translation. The move to attain linguistic equality is gaining momentum and it will continue to do so because as Jean Jaures noted: "Esperanto estas la Latino de la demokratio".

Rezolucioj de la 26-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

I

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,
Rememorante la valoran kontribuon de
D-ro T. Einihovici al la laboro de la
Asocio,
Notante, ke Sinjorino Einihovici jam
organizis premion, honore al sia edzo,
por la plej bona junula studento de la
venonta jaro,

Dezirante plu honori lian memoron

Decidas starigi fonduson, nomotan "La Fonduso Einihovici" por helpi aŭstraliajn junulojn partopreni en kongresoj de TEJO, kaj

Invitas membrojn malavare donaci al tiu Fonduso.

II

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

Akceptas, kun bedaŭro la emeritiĝon de la Redaktoro de "Australian Esperantist" ekde la komenco de 1989,

Dankas al S-ro Herbert Koppel pro lia servado kiel redaktoro dum la jaroj 1974-1988,

Peŝas al li eldoni du pliajn numerojn de la organo antaŭ la fino de la jaro, inkluzive la kongresan numeron,

Invitas la Estraron trovi novan redaktoron, por eldoni la gazeton sesfoje en ĉiu jaro,

Rekomendas, ke estontece "Australian Esperantist" enhavu rubrikon aŭ suplementon en la angla lingvo, kiu priskribu la sukcesojn de Esperanto tutmonde, kaj alian informojn por konvinki la publikon kaj registarajn instancojn pri la valoro de Esperanto, kaj

Decidas sendi la gazeton, aŭ laŭcirkonstanco la suplementon, al aŭstraliaj eminentuloj, registaroj, instancoj kaj la precipaj naciaj gazetoj.

III

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

Dankante la Komitaton, kiu organizis la Somerlernejon en Armidale kaj salutante la grupon ĉe Profesoro Ronald Gates,

Decidas akcepti la inviton de la Esperanto-Societo de Sud-Aŭstralio okazigi somerlernejon en Adelajdo en Januaro 1989.

IV

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

Decidas, se ne estos invito de alia urbo antaŭ la fino de 1988, inviti la Esperanto-Federacion de Viktorio organizi kongreson en 1990.

A.E.A. Korespondkurso Servo

Mi volas danki al ĉiuj miaj kunlaborantoj, speciale Tom Elliott, Ray Ross, Herbert Koppel kaj Alan Towsey; Joyce Turner, Ruth Morrison, Helen Stone, Vera Payne, David Poulson kaj Chris Dean; Prof. Robbie Robertson, Margaret Chaldecott, Bob Felby, multaj aliaj kiuj helpas daŭrigi la Servon.

En 10 jaroj ni vendis entute 599 kursojn, do mezkvante 60 en jaro. Kvankam mi opinias, ke pli juna, pli vigla homo povus duoblige tiun rezulton, mi mem ankoraŭ guas la deĵoron kaj, se la Asocio deziras, mi estas preta daŭrigi ĝin almenaŭ dum la resto de la 1988-1989-a periodo.

John Moore, septembro, 1988.

Dujara periodo 1 Dec. 1985 ĝis 30 Nov. 1987.

ENSPEZOJ

"Bonan Tagon" 66 Kursoj	...	\$1174.20
"Jen Nia Mondo" 24 Kursoj	...	489.30
"Esperanto Teacher" 15 Kursoj	...	338.28
"Progresive" 11 Kursoj	...	270.10
"15 Paŝoj" 5 Kursoj	...	174.80
Poŝtpagoj/Donacoj	...	75.78
Libroj, Kasedoj venditaj	...	152.96
Ricevita por aliaj kontoj	...	7.20
Tropagoj redoneblaj	...	39.80
Bankintereso, ĉek-konto	...	40.83
Ŝpar-investa konto	...	345.71

Enspezoj 2 jaroj

\$3108.96

ELSPEZOJ:

Reklamoj	...	\$480.00
Stok-aĉetoj	...	1345.13
Poŝtkostoj	...	315.81
"Esp. Bulletin" presado	...	140.29
Kaŭĉuka stampilo	...	9.40
Donaco al Jubilea Fonduso	...	20.00
Pago al aliaj kontoj	...	7.20
Tropagoj redonitaj	...	39.80
Fed. ĉek-impotoj	...	7.80

Elspezoj 2 jaroj: \$2570.43

Havaĵo je la 30 Nov. 1987.

Mono:

Ŝparkonta investo, Comm.

Savings Bank

Ĉek-konto: \$2365.81

Stoko: 477.23

Stoko:

Valoro taksita laŭ orig. kosto 2167.00

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$25
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$15.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 252 (332)
MELBURNO
Novembro-December, 1988

GRAVAJ LINGVAJ BATALOJ — AŬ TEMPESTOJ EN TASO?

Flagras militoj en Esperantolando. La frontoj estas foje ne klare difinitaj, kaj preterpasantoj povas troviĝi senaverte en danĝero, sed la du precipaj malamikaj trupoj estas la Praga Skolo kaj la Analiza Skolo. Ambaŭ grupoj ŝajnas kredi ke la malrapida progreso de Esperanto ŝuldiĝas al mankoj en la nuna lingvouzado.

"La Praga Skolo" (foje nomata le "Iltisa", laŭ la eldonejo Artur I. Iltis en Saarbrücken, FRG) konsistas plejparte el la ĉefoj Karel Piĉ, Jozef Rumler kaj Eli Urbanová, kaj iuj neĉeĥoj, inter ili la germano Reinhard Haupental kaj la hispano Fernando de Diego. Ĉe ili floras neologismoj. Plej detale en sia broŝuro kun la signifoplena titolo "Abunde kaj Redunde" Jozef Rumler prezentas la tezon, ke samkiel Esperanto bezonas sciencajn terminarojn, ĝi bezonas literaturan lingvon riĉan je sinonimoj; nia literaturo ne povas esperi rivali tiujn de la naciaj lingvoj, se niaj aŭtoroj restas katenitaj al la malriĉa Fundamenta Esperanto.

Fernando de Diego tradukis multajn verkojn kaj uzis grandan nombron da neologismoj, sed laŭ mia scio li neniam prezentis sisteman pledon; ŝajnas ke li uzas novan vorton laŭ kaprico. La plej konata produkto de la Praga Skolo estas la romano de Piĉ, "La Litomiŝla Tom-

bejo". Mi jam esprimis en ĉi tiu revuo mian opinion, ke la libro malsukcesas kiel artaĵo, sed nun mi diros ion pri lia prilingva pledo, kiu okupas preskaŭ kvinonon de la verko.

Piĉ prave atentigas pri la troa ŝarĝo portata de iuj vortoj; lia propono "ersti" anstataŭ "nur" en la senco "ne pli frue ol" estas pripensinda. "Li venos nur sabaton" — ĉu tio signifas, ke li venos sabaton, sed ne aliajn tagojn, aŭ ke li venos ne pli frue ol sabaton sed eble plurfoje poste? La troaj signifoj de "de" estas bone konataj, kaj Piĉ proponas "ab" ("La trajno ab Parizo"). Pluraj aliaj proponoj (ekz. "taŝo" por mansako, "kiki" anstataŭ piedfrapi) ŝajnas al mi utilaj.

Malgraŭ sia reputacio Piĉ asertas, ke skemismo estas nepra kondiĉo de la sukceso de Esperanto: "Insurekti, insurekcio kaj insurgento ne estas Esperanto, sed la plej fuŝa okcident-eŭropa pigino". (Oni volonte aldonus longan liston de tiaj fuŝaj du- aŭ pluroblajoj: "redakt-" devas konkuri kun "redaktor-" kaj "redakci-", kaj apud "feder-" oni legas kaj "federal-" kaj "federaci-".) Kaj fakte Piĉ estas siaspeca skemisto: el "jurnalo" li retroderivivas "jurno" = tago; el "ascendi" kaj "descendi" li tiras "scendi" = iri, paŝi; se "putino" signifas virino, kiu sin prosti-

tuas, do "puto" estas tiaspeca viro; PIV konas nur la pseŭdo prefikson "retro-", sed Piĉ ne hezitas uzi "retra", "retre", "retren" kaj iam sendube "retri" kaj "retro". La malo de "malgraŭ" estas laŭ Piĉ "graŭ" = ĝuste tial. La prefiksa uzo de "po-" ĉe verboj ĝenis min, sed eblas argumenti, ke ĝi estas pie Fundamenta: "Li poidadis" = li iris intermite, po iomaj distancoj.

Piĉ pravas, ke aro de liaj "neologismoj" estas fakte originale el la plumo de Zamenhof mem: "dos" = de sur; "men" = malpli; "sob" = malsupren, "sor" = supren, ktp.

Sed lia skemismo estas tute nekonsekvenco. La apudesto de "insurekt-, insurekci-" kaj "insurgent-" malpli ĝenas ol sinonimoj por tre ofte uzataj esprimoj, kiaj eble ("forsin"), sed ("aŭtem, ma"), kaj ("ak"), ĉar ("ham"), eĉ se Piĉ asertas, ke temas pri bezonataj preskaŭsinonimoj. Kaj kion ni opinii pri "hebdomado" = semajno, "nok" = ankoraŭ, "silvo" = arbaro, "sovente" = ofte, aŭ la groteskaj "oŭ keĵ" = en ordo (okay!) kaj "ples" = mi petas (please!)? Kiel nia lingvo gajnu, se ĝi akceptus tiajn sinonimojn?

Jen specimeno de la prozo de Piĉ, hazarde elektita: "Ak siaj fenestroj estas plenaj de pelargonioj. La pelargonioj floras. Ili estas blankaj, rozeaj, violeaj, ruĝaj kaj vineaj. . . . Si zorge transplantadas ilin, ĉiujare. Kaj matene, post la oka, kun oranĝea kruĉeto ŝi obiradas kaj verŝumas ilin."

La ekstravagancoj de la Praganoj altiris multe da kondamnado, eĉ kalumniado, sed la "Skolo" estas manpleno da estetikuloj, kiuj volas kultivi iom preciozan beletran lingvaĵon; la ĉiutagan lingvon de plisimplaj animoj ili pretas lasi netuŝita. Male, la **Analiza Skolo** polemikas por reformo de ĉies lingvouzo. Neniu nuna uzanto de la lingvo sukcesas en iliaj ekzamenoj, ĉar nelogikaj nacilingvaj uzoj koruptis la pure Fundamentan lingvon kiu baziĝas sole sur logiko; kio estas nelogika en la nuna Esperanto — kaj tio estas multa — estas senhezite elsarkenda.

La fondinto de la skolo estis la nun mortinta hispano Luis Mimó Espinalt, sed ĝia ĉefa figuro estas la germano Richard Schulz (li sin nomas Rikardo Ŝulco). Fortan apogon al Schultz donas aliaj germanoj, precipe Hermann Behrmann (Hermano Bermano), kiu interrompis sian instruistan karieron por estri la Esperanto-Centron de Paderborn.

Grandparte tiu centro dediĉas sin al eldonado de la libroj de Schulz.

Schulz estas certe nekutima homo. Li venis tre malfrue al Esperanto — nun li aĝas eble okdek kvin jarojn, sed en malmultaj jaroj li faris pli ol preskaŭ ĉiuj aliaj en pardekoj. Li verkis bonajn germanlingvajn librojn pri Esperanto, li tradukis plurajn ampleksajn germanajn beletraĵojn, li verkis libron da robajoj, kaj senfinan serion da prilingvaj artikoloj kaj libroj. Li malavare donacis al mi kvin-ses el siaj libroj, kaj mi supozas, ke li elspezadas grandan sumon por prezenti sian vidpunkton.

Jen tipa ekzemplo de la rezonado de la Analiza Skolo (ĉi-foje de Mimó): "alveni" estas misa formo, ĉar "al-" ne signifas la atingon de la celo, oni do uzu "ĝisveni". Trafa rezonado, sed ĉu oni povus ŝanĝi la kutimojn de jarcento? Ĝuste tion celas Richard Schulz.

La listo de uzoj, kiujn Schulz ade atakas, estas longa. Li rifuzas "dank al-" li militas (prave!) kontraŭ la uzado de "unu" kiel surogata nedifina artikolo (konstanta peko de nia plej klera vivanta esperantisto, Gaston Waringhien); la "-io-" finajo por landnomoj; "tiel/kiel" por esprimi gradojn li konsekvence uzas "tiom/kiom"; "sidiĝi, stariĝi, kuŝiĝi" anstataŭ "eksiĝi, ekstari kaj ekuŝi"; minuskligo de landnomoj ("anglo,, japano" ktp. anstataŭ "Anglo, Japano"); senpera verbigo de adjektivoj ("eblas, notindas, li ĝentilis" ktp. ne akceptablas — pardonu, ne estas akcepteblaj), prefiksigo de sufiksoj (kaj inverse) — "etkomercisto, etburgo" ktp. estas elsarkendaj; "aspektismo" estas lingva eraro; kaj la Praga Skolo meritas tre mallaŭdajn epitetojn.

Schulz prave diras, ke "nomiĝas" estas misa formo; persone mi preferas formon, kiun li eĉ pli forte malaprobis, nome "il nomatas Petro". Schulz ne simple kritikas, li ankaŭ preskribas, almenaŭ forte proponas kuracilojn. Li esperantigas ĉiujn person- kaj loknomojn. Nu, jen problemo ankoraŭ solvota, kaj Schulz montras kuraĝon, eĉ je la risko doni rikialon al siaj oponantoj, ĉar li emas traduki: Harry Butler iĝas "Heĉjo Ĉefservisto" kaj Ellen Chatham "Henjo Babilŝinko" (ŝajne dividis "chat-ham" kaj tradukis la du elementojn, sed laŭsupoze tiu "-ham" signifas ne "ŝinko" sed "vilaĝeto". Sendube Schulz afable akceptus tian korekton, ĉar li volas stimuli

debaton). Jes, unuopaj proponoj estas bizaraj, sed kiam Esperanto fariĝos tutmonde "parolata" lingvo, oni devos iel ordigi la nunan haoson.

Kio pri inaj nomoj? Kiel ni distingu inter Mario kaj Maria, Karl kaj Karla? Kalocsay decidis: "Ĉiu virina nomo estas rigardata kiel adjektivo, rilatanta al la (ellasita) vorto ino". Alivorte, virinaj nomoj finiĝas per -a. Tio ŝajnas sufiĉe kontentiga, se temas nur pri eŭropaj nomoj, ĉar fakte tie inaj nomoj grandparte finiĝas per "-a". Sed en Japanio, ekzemple, tre multaj virinaj nomoj finiĝas per "-ko". "Sumika" (por la naciilingva "Sumiko") eble ŝajnas same stranga al japano kiel Edno al anglo. Schulz konsekvence uzas "-ino": Mariino, Angelikino, Elizabetino, Desdemonino" ktp. La propono de Schulz estas logika, sed ankoraŭ ne ricevis multe da aprobo.

Plej varme furoras la disputo pri "aspektismo" kaj "tempismo", la nova vesto de la malnova "-ita/-ata-" debato. La rezulto de la debato en la periodo 1960-3 estis venko, almenaŭ voĉdona plimulto, por la "itistoj" ((aŭ "aspektistoj").

Mankas spaco ĉi tie por pritrakti la debaton; sufiĉu nur doni ekzemplon. Ni imagu, ke mi liveris mian aŭton al riparejo antaŭ du tagoj. Hodiaŭ mi telefonas kaj oni informas min: "La aŭto estis riparata hieraŭ". Nu, ĉu mi supozu, ke ĝi estas jam veturpreta aŭ ne? Itisto dirus, ke ne estas sufiĉe da informoj — jes ja, hieraŭ la riparisto laboris pri la aŭto sed ni ankoraŭ ne scias, ĉu li plenumis la laboron. Se fakte li plenumis, oni devus diri: "La aŭto estis riparita hieraŭ". Atisto tamen dirus, ke la afero estas klara: la verbo "estis" jam indikas, ke temas pri pasinta tempo kaj ke la ago ripari jam plenumiĝis — do mi konkludu, ke la aŭto estas nun tuj uzbla.

Laŭ mia kompreno (mi estas probable ne plu kuracebla itisto) ambaŭ argumentoj estas logikaj sed havas diversajn deirpunktojn. Schulz tamen asertas, ke nur la tempismo estas logika kaj ke necesas, ke oni aŭ pruvu ĝin nelogika aŭ akceptu ĝin oficiale.

Sed endas pli bone kompreni, kio estas "logiko" en lingvo-uzado. En multaj lingvoj duobla negativo plifortigas negativcon: mia hispana amikino foje incitete min: "Tu no sabes nada — Vi ne scias nenion". Responde mi aplikis la

logikon de mia angla lingvo: Se mi ne scias nenion, jen do mi scias "ion", sed tiu frazo estas apenaŭ direbla en la hispana. Kio estas pli logika: duobla negativo igas pli negativa, aŭ duobla negativo nuligas negativcon? Kaj laŭ sia germanlingva logiko Schulz skribas "Ne lasu vin trompi", anglalingvulo emas supozu, ke tio signifas, ke oni ne permesu al si la plezurakon trompi iun alian homon. Por esprimi tion, kion Schulz intencas diri, anglalingva logiko postulus "Ne lasu vin trompiĝi" (aŭ "esti trompita/trompata"). Schulz skribas, tute kompreneble sed laŭ naciilingva kutimo "dum longaj jaroj", sed ĉu iu jaro povas esti pli longa ol aliaj? Li ja volas diri "dum multaj jaroj", sed ĉu ne estus pedante lin "korrekta" kaj postuli nepran logikon? Ĉu logiko vere elstaras en lingvouzo, kaj se jes, kia logiko?

Eble lige al sia tempismo, Schulz preferas la kompleksajn verbformojn. "Mi estas ricevinta vian leteron, kaj kiam vi estos leginta mian, vi scios." Malgraŭ dankosento al la afabla kaj meritplena ĉefo de la Analiza Skolo, mi trovas tion nur regreso. Esperanto ja disponas pri bela kaj eleganta kaj ege simpla tenstriopo, kaj la kompleksajn formojn oni uzu nur kiam tre subtila precizeco estas necesa — kaj eĉ tiam mi bonvenigus uzon de tiaj formoj, kiaj "Esperanto paro!atas, se mi sciintus (= estus sciinta)".

Alia eta "skolo", al mi tre simpatia, estas tiu de s-ino Akiko Woessink-Nagata, japandevena edzino de nederlandano. Ŝi pledas kontraŭ la "okcidenta dialekto" kaj por la esperantigo de jam ekzistantaj vortoj; ĉar ni havas vorton por "mil", kial ni diras "kilometro" anstataŭ "milometro"; kial paroli pri "diakrona/sinkrona", kiam eblas diri "tratempa/samtempa"? Tia argumento aplikeblas ankaŭ al scienc-teknologiaj terminoj. Ĉu ni imitu la ekzistantan grek-latinan haoson kaj diru "kardio!ogo" aŭ ĉu ni parolu simple pri "korspecialisto"? Ankaŭ tiu debato estas, mi suspektas, ne finita.

Deprima aspekto de la supre skizitaj lingvobataloj estas la reciproka amareco: kritiki ies lingvouzon similas personan militdeklaron, kaj eĉ neŭtraleco apenaŭ eblas. Kaj kompreneble la oponuloj estas "pli emociecaj ol logikaj" kaj ne komprenas nian vidpunkton.

Do ne pravas, ke estas "En Okcidento nenio nova". Cu tiel niaj sindediĉaj aktivuloj plej bone uzas siajn kreemon kaj energion, vi mem juĝu. Rimarkinde estas, ke kiam ili sin direktas al la leganta publiko, ofte oni ne povus scii sole laŭ la "lingvouzo" al kiu skolo ili apartenas. Cu do ekzistas, malgraŭ ĉiaj argumentoj, komuniza Esperanto tute taŭga por ĉiuj?

—TREVOR STEELE.

LA ESPERANTISTO EN LA NAŬDEKAJN JAROJN

Post la jubileaj festoj — eĉ dume — pluraj esperantistoj sin demandas pri la motivoj de la movado: Kion ni volas atingi per Esperanto? Post cent jaroj, ni povas prezenti al la mondo maksimume sepdek mil da spertaj esperantistoj kaj duonmilionon aŭ milionon da nespertaj. Ene de limita kadro, ni atingis mirindajaron. Mondskale, ni restas neefike malmultaj kontraŭ la ada disvastigo de la angla lingvo kiel internacia komunikilo. Konsidere de la nuntempa rango de la movado, ni povas estonte pluvarki eble dek aŭ dudek milionojn. Kien de tie? Por kio utilos la estonta Esperanto? Tion ni devos decidi kiel aro, kaj decidi baldaŭ.

La originala celo de la lingvaj pioniroj — ke nia fariĝu la universala lingvo — ŝajne estas revo, kiu nin evitas per ĉiu kuranta jaro. Konkurantoj vidis en tio mankon en Esperanto, kaj mem provis: ili tute malsukcesis. Tamen nombre ni ne imponas multe pli ol Esperanto de la dudekaj jaroj. Nia agnosko fare de la internaciaj instancoj kaj la gravaj registaroj, malgraŭ ĉiuj entuziasmaj provoj de UEA, estas kaj restas skiza, degna. Teorie nia restas la plej bona solvo al la problemoj de internacia komunikado — sed praktike la angla, malgraŭ ĉiuj siaj frenezaj neregulaĵoj kaj malraciaĵoj, antaŭenpaŝas nehaltigeble — ĉar ĝi disponas pri rimedoj, kiujn Esperanto malhavas, kaj devas malhavi pro sia naturo. Mi aparte pensas ĉi tie pri la superrego de la angla en la komercaj kaj amaskulturaj sferoj tutmonde. Sed eĉ se miraklo okazus (kaj mirakloj ne maloftas en la Esperant-lingva historio), kiel profitos ĝia universaligo al ni? Endas, ke ni ordigu niajn antaŭ-ecojn pri la apliko de la lingvo. Ni ĉiuj rekonas, ke

ĉe ĉi tiu lingvo ne temas nur pri komunikado — ĝia ideologia enhavo esencas. Niaj konkurantoj plurfoje mokis tiun amon sentimentalan al Esperanto — ĉar ili rilatis al siaj lingvoj seke, malromantike. Sed, se Esperanto fariĝus senpripense universala, ĉu ankaŭ Esperanto ne riskus perdi sian pene disvolvitan individuecon, lingvan kaj ideologian, por iĝi seka komunikilo? Ĉar oni devas memori, ke lingvo kaj movado ĉe ni nedisiĝeblas. Esperanto ne iĝus la Esperanto, kiun ni konas, sen sia idealisma fono. Senigite de tiu ideologio, la lingvo iĝos nerekoncbla. Sama forme, sed ne sente. Ni devas pragmate trakti la aferon, kaj konstati, ke la universaligo de Esperanto ne troviĝas en la videbla futuro. Gardi la lingvon laŭ ĝia pli-malpli nuntempa rango ŝajnas la preferinda agokurso, kvankam komprenable pluprogreson oni ankoraŭ tre bezonas.

Kion do faru la individua Esperantisto, por plugardi kaj pluprogresigi la lingvon? Lingvo kaj sento ĉe ni nedisiĝeblas — tio estas nia individueco, nia antaŭ-raĵto. Nia lingvo estas bela — nenecese emfazi tion. Necesege praktikiti tion. Lingva perfektigo ja ne endas — sed efektive indas la peno, kaj rekompcas. La Esperanto-propagando tro longe emfazis la simplecon de la lingvo. Tio demonstreble neefikas: nia lingvo havas proprajn komplikajojn kaj apartaĵojn, same kiel ĉiu alia. Ilin kontraŭbatali estas mortige; ilin preteratenti — krime. Kion pli gajni, post jarcento da unupaĉaj gramatikoj, per krio pri "simpla" — kaj krome, kiom multe perdi per la subaludo, ke Esperanto estas lingvo malprofunda kaj neesprimiva? Bonan trakton havu la lingvo. Tion ĝi meritas.

Apud la lingvo, ricevu nia kulturo la atenton meritatan. La Esperanto-kulturo iam estis infaneca kromokupo. Ne plu. Ĝi efektive estas kerna al Esperantismo. Legi literaturon ne plu estas nur ĝui la produkton de alies penso: estas partopreni komunumon, pri kiu la ekstera mondo ne scias kaj ne povas scii. Rilate al la pli poluritaj naciaj literaturoj, ĝi malegalas, foje nespertas. Sed ĝi apartenas al homoj tra la tuta mondo. Kaj ĝi apartenas specife al ni, specife al nia rondeto. Niai samideanoj kreas ne por blinda postmemoro, sed rekte por ni. Tion ni profitu.

Legi tian literaturon — ĉu poemojn, romanojn, teatraĵojn, eseojn, rakontojn aŭ artikolojn — estas io esence al ni, neebla en naciaj kunteksto. Ĝi estas ago ne pasiva, sed aktiva, energia kontribuo al nia esperantisteco, tiom kiom korespondado kaj kongresado. Tiamaniere ni spitas al la mondo, kiu plejparte indiferentas al ni, kaj indiferentus, kion ajn ni faru — krom se ĝi nin indiferentigos. Tio ne okazu. Ni faris nian parton. Se mankas sukceso, ne nia estas la kulpo. Se rezultos rikolto, des pli riĉa estos tiu, kies fruktojn ni jam delonge ĝuis inter ni, kvankam malpli romantikajn.

—NICK NICHOLAS.

(Red. Jen la pensoj de 17-jaraĝa gimnaziano, Esperanto-aŭtodidakto, kiu, en la pasinta Kristnaska ferio, sukcesis kun Honoro en kaj la Elementa kaj la Supera ekzamenoj.)

La 100-jara jubileo de la Esperanto-Grupo Nurembergo

En 1888, do unu jaron post la apero de la unua Esperanto-libro, fondiĝis en Nurembergo (Germanio) la unua Esperanto-grupo en la mondo.

Inter la 21-a kaj 23-a de oktobro ĉi-jare, la Esperanto-grupo en Nurembergo festis sian centjaran jubileon. 200 Esperantistoj el 16 landoj partoprenis, inter ili esperantistoj el Brazilo kaj Koreo kaj Radio Polonia sendis specialan raportiston al tiu grava festo.

Vendredon vespere (21/10), la urbestro okazigis akcepton en la historia festalono de la malnova urbodomo. La sabato (22/10) komenciĝis per gvidado tra la antikva parto de la urbo. Posttagmeze oni solenis la 80-jaran jubileon de la Germana Esperanto-Instituto. Vespere komenciĝis la granda festo per la salutvortoj de Gregoire Maertens, Vic-Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. La festparoladon faris D-ro Werner Bormann, membro de la Akademio de Esperanto.

Ankaŭ la muzika kadro, kiun donis la fervojista ĥoro kaj orkestro de Nurembergo, kontribuis al bona etoso dum la tuta vespero.

Dimanĉe antaŭtagmeze (23/10), Claude Piron, la konata svisa Esperanto-

verkisto, tre interese oratoris pri la "Sociologia fono de la Esperantomovado" kaj entuziasmigis la ĉeestantojn. Partoprenis la feston ankaŭ aŭstraliaj esperantistoj per siaj sonbendosalutoj registritaj fare de Karl-Heinz Renschler dum la Pacifika Kongreso en Brisbano.

A.E.A. SOMERLERNEJO EN ADELAJDO

La Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo akceptis la taskon organizi Somerlernejon en Adelaido kaj rezervis "Aquinas College", North Adelaide de lundo 9-a ĝis vendredo 20-a de januaro, 1989. Instruos Vera Payne, Marjorie Ellyard, Arthur Cocking, Marcel Leereveld kaj Sino Fay Koppel gvidos "Literaturan Cirkolon".

Ĉar nia administracio kaj la kolegia stabo ferios dum Kristnasko kaj Novjaro, bonvole sendu T U J vian aliĝon al

Max Wearing, 30 Westbury St.,
Hackney, S.A., 5069.

Nepre aldonu vian Aliĝkotizon \$50 kaj vian deponon de \$40 por ununokta dormado.



FORPASI RIET BENNETT

Nia ligano kaj amiko Riet akcidente mortigis je la 19-a de oktobro 1988. Ŝi mortis subite kaj terure, nur kelkajn monatojn post la forpaso de la edzo Don. Riet kaj Don ambaŭ eklernis Esperanton kaj Riet daŭrigis la studadon ĝis, lastan monaton, ŝi plenumis la postulojn de la Supera Ekzameno, en kiu ŝi sukcesis "Kun Honoro".

Riet estis komitatano de nia Ligo kaj ŝi instruis Esperanton kun sia kutima bonhumoro kaj afableco. Ŝi partoprenis en la 4-a Pacifika Kongreso en Brisbano en septembro. Tie, kaj post sia reveno al Perto, ŝi konfirmis sian intencon kunlabori por la idealoj de la internacia lingvo.

Al la familio de ĉi tiu milda sinjorino

ni sincere kondolencas. Dek sep anoj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio ĉeestis la funebro-ceremonion.

—VERA PAYNE.

o **MELBURNO:** La Zamenhof-Festo okazis la 3-an de decembro en la halo de la Skoltinoj. Ĉeestis 30 esperantistoj kaj amikoj.

La jam populara komuna manĝo malfervis la vesperon, kies distra programo komenciĝis per kantoj de la Waverley-grupo. Poste Waverley-anoj laŭvice rakontis, honore al la 200-jara jubileo de Aŭstralio, elstarajn "Historiajn Eventojn depost 1788".

Dum "Literatura Interludo" Herbert Koppel deklamis poemojn, kiuj rilatis al ĉies deziro al tutmonda paco kaj Fay Koppel memorigis Len Newell, kiu mortis subite antaŭ precize 20 jaroj.

Membroj de la Oakleigh Grupo prezentis kvaropon da diversaj antaŭ ol Waverley-anoj denove ravis per harmonia kantado, dank' al la gvidado de Isabel Gale.

Federacia prezidanto Ruth Tumman revuis la jaron 1988 kaj denove Isabel Gale surpaŝis la scenejon por plaĉi per "Stilofon-ludado".

Festparolis Don Pescod, kiu opiniis, ke Doktoro Zamenhof preferus, ke oni rigardu antaŭen, anstataŭ malantaŭen. Parolinte laŭ la temo "La vero liberigas vin", li konkludis, ke niaj sintenoj kaj konduto plej gravas por antaŭenigi nian celon.

• **Sidnejo:** Je 24-a de oktobro Tom Elliott montris videobendon pri la Aŭstralia kaj Pacifika Kongresoj en Brisbano. Semajnon poste ni legis el diversaj eksterlandaj gazetoj.

Je la 7-a de novembro Alan Dixon prezentis lumbildojn pri vizito al Alasko. Semajnon poste ni bonvenigis usonan esperantiston Dennis, kiu eklernis la lingvon en Romo. Je 28-a de novembro James Harwood prezentis raporton el angla gazeto, kiu priskribis Redfern kiel viglan regionon, kiu ŝanĝas sian ŝajnon de simpla, laboristklasa domaro al loĝloko por novaj riĉuloj.

• **Kvinslanda Federacio:** La Jarkunveno okazis la 13-an de septembro, dum la Pacifika Kongreso. Oni elektis la sekvantan Estraron: Prezidanto: Ray Ross; Vic-Prez: Tom O'Grady; Sekretario: Kay Andersen; Kasisto: Merv Schramm;

Publikaj Rilatoj: Peter Keates. Estraranoj: Carson Thomas, Kevin O'Brien, Decia Shonhan, Gaye Phillips, Annie Spencer, Jim Dimo, Jennifer Dimo (Skoltoj).

Estis decidite, ke la kotizo estu \$10, kun familiaj membroj, pensiuloj, studentoj \$5. La kunveno elektis la Ormarbordon por la konferenco en oktobro 1989.

• **ST. LUCIA:** La membroj okupiĝis pri legado kaj diskutado de "La Faraono", de Bolislav Prus. Venontjare ili okupiĝos pri la "Aŭstralia Antologio".

• **BRISBANO:** Okazis, la 31-an de oktobro, la jarkunveno de la Erisbana Esperanto-Societo. Estraro por 1989 elektigis jene: Prezidanto: Trevor Steele; Vic-Prezidantoj: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Cath Sullivan; Kasisto: Jack Carroll; Publikaj Rilatoj: Lillian Harrison; Red. Babilado: Peggy Ross; Analisto: Ray Ross; Bibliotekistoj: Ruth Morrison, Marie Keates; Libro-Peranto: Lillian Newman Estraranoj: Peter Keates, Merv Schramm, Ted Duffy, Stan Stokes, Connie White.

Estis decidite stariĝi fonduson por propagandi Esperanton. La unua provo tiurilate estos distribui al la 34 publikaj bibliotekoj en Brisbano, Esperanto-paĝnotilojn. Ĉirkonstancoj diktos sekvantan agadon, sed la societo intencas adopti aktivan rolon en la estonteco rilate al reklamado. Felician Kristnaskon kaj plensukcesan Novjaron al ĉiuj samideanoj.

—RAY ROSS.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** En 1988 ni presigis kelkajn kartonajn afiŝojn por elmontri ĉe la feriejo Iwasaki (kaj eventuale aliaj lokoj) kun invito al Esperanto-parolantoj telefoni nin.

Ni sentas la mankon de nia kara ano Merle Packham — fondinto kaj tre aktiva klubmembro — kiu translokiĝis suden por esti apud siaj familianoj. Al ŝi ni deziras ĉion bonan — kaj ni atendas novajon pri la eventuala fondo de Esperanto-Klubo en Alstonville, kie ŝi nun loĝas.

—JOHN MOORE.

• **Postkongresa gratulo:**

Pere de la gazeto mi deziras gratuli la Brisbanan grupon pro ĝia bonega organizado de la 4-a Pacifika Kongreso. Ĉio iris elate kaj agrable. Mi speciale ĝuis la Aŭstralian Vesperon, por prezenti kiun la membroj devis forte labori.

—KAY HOWE. Yeppoon.

o **TOOWOOMBA:** Nia Zamenhofa Festo okazis la 26-an de novembro. Dekses anoj kaj amikoj ĝuis la kuneston kaj ludojn (preparitajn de Dianne Lukas, Sandra Connors kaj Jean Lehane).

La 11-an de decembro "Blanka Elefanta"-budo estis aranĝita ĉe la Dimanĉa Foiro. Dianne Lukas kaj Sandra Connors estis la entreprenantoj kaj membroj malavare donacis diversajn aĵojn.

Kongresanoj skribis al la Radakcio

Ni tre ĝuis la Kongresojn kaj ankaŭ la Postkongreson kaj ĉiuj novzelandanoj estas kontentaj. Aŭstralio ŝajnas esti multe pli prospera kaj progresanta ol nia Novzelandoj.

Post Bundaberg kaj la Koralrifoj ni vizitis Sydney por kelkaj tagoj kaj fine ni veturis al Cronulla, prospera urbo ĉe la maro, kie ni loĝis ĉe anglaj geamikoj. Entute tre sukcesinta vojaĝo.

—J. MAJOR, Redaktoro de "N.Z. Esperantisto"

—ooOoo—

Via kongreso en Brisbano restos dumvive en mia memoro. Kvankam nur gasto en via Aŭstralia Pacifika E-Kongreso mi partoprenis ĝin kun intereso de ĉia komenco ĝis la fino, kunveno post kunveno kaj neniam ĝi estis enuiga aŭ laciga. Vi multe laboris kaj postlasis en mi la memoron al Esperantistoj entuziasmaj, laboremaj, lertaj kaj koraj. Por viaj gastoj vi malfermis viajn korojn kaj tio donis al mi ĝojon kaj bonfarton en via kongreso kaj en via rondo.

Elkore mi dankas vin por ĉio. Kun malĝojo mi adiaŭis de vi karaj gesamideanoj, ĉe kiuj mi renkontis tiom da simpatio kaj amikeco.

—KARL-HEINZ RENSCHLER, Bad Krozingen, Germanio.

KOREKTO

En A.E. N-ro 251 (Septembro-Oktobero, 1988) estis raporto, rilate la Premion Onisaburo Deguĉi, ke mi donacos 2000 guldenojn por junuloj en la Pacifika Regiono kaj 2000 guldenojn al la Fonduso Tim Einihovici.

Tio, kion mi diris, precize, estis, ke mi donos 2000 guldenojn por helpi al aŭstraliaj junuloj partopreni en Pacifikaj Kongresoj, celo paralela al tiu de la Fonduso Einihovici. La alian 2000 guldenojn mi iam transdonis el UEA por ebligi la eldonon de libro de gravaj internaciaj dokumentoj, ekzemple la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Universala

Deklaracio de Homaj Rajtoj.
—RALPH HARRY.

26-a AUSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESOJ

11a-20a de septembro, 1988

Brisbano

Late Supplementary List

- 176. Galina Sliva, Perth
- 177. Bettie Hart, Sydney
- 178. Joyce Newell, Esk, Q'ld.
- 179. Joikacu Tanaka, Tokyo
- 180. Keniči Saito, Tokio
- 181. Teruko Ito, Tokio
- 182. Joŝie Fukuŝima, Tokio
- 183. Morag McMillan, McMahon Pt., N.S.W.
- 184. Vlado Kosef, Cobar, NSW
- 185. Barbara Bruer, Strathalbyn, S.A.
- 186. Nikola Vukicevic, Jugoslavija
- 187. Frank Ward, Brisbane
- 188. Kyoobei Nakasima, Tokyo
- 189. Ĉizu Nakasima, Tokyo
- 190. Guang Hua, Sydney
- 191. Ross Robbins, Ormiston, Q'ld.
- 192. Neil Freer, Upper Hutt, N.Z.
- 193. Alison Slade, Brisbane, Q'ld.
- 194. Kevin O'Brien, Sorrento, Q'ld.
- 195. Dai Songen, Beijing, Ĉinio
- 196. Zhu Mingyi, Beijing, Ĉinio
- 197. Wei Bing, Qingdao, Ĉinio
- 198. Wang Sheng An, Qingdao, Ĉinio
- 199. Fengshu Zeng, Qingdao, Ĉinio
- 200. Stan Bruton, Devonport, Tas.
- 201. Jo Knight, Auckland, N.Z.
- 202. Derrick Knight, Auckland, N.Z.
- 203. S-ino Atsuo Oba, Tokyo
- 204. Keiti Matumoto, Japan
- Vizitanto: S-ino Hana Messnerova, Czechoslovakia
- Final State Distribution: Queensland 45, N.S.W. 36, Japan 26, New Zealand 24, Victoria 20, Western Australia 15, South Australia 9, China 7, U.S.A. 7, Belgium 3, Canada 2, A.C.T. 2, Gt. Britain 2, Venezuela 2, New Guinea 1, Germany 1, Jugoslavia 1, Tasmania 1.

RECENZOJ

Sepdek-sep ŝlosiloj por la japana civilizacio. UMESAO-Tadao, Tokio, 1987, 353 p. Tradukita el la angla 'Seventy-seven keys to the civilization of Japan' (Osaka, 1985) fare de Geoffrey Sutton.

Jen fama kaj sendube vaste-konata por la anglalingva mondo verko eldonita nor la Centjara Jubileo de Esperanto kaj

havebla de la Japana Esperanto-Instituto en Tokio je prezo ne-montrita. La ĉefa aŭtoro estas la eminenta D-ro T. Umehao, ĝenerala direktoro de la japana Nacia Muzeo pri Etnologio, kiu estas ankaŭ esperantisto. La libro estas bibliografia kuriozaĵo ĉar ĝi ne havas japanan eldonon bazigante sur la prelegoj de D-ro Umehao en la renomata Franca Kolegio (Collège de France), kiu situas tuj apud la Sorbono. La unuaj 82 paĝoj kaj la postskribo estas verkitaj de la ĉefa aŭtoro kaj la cetero de kvar aŭtoritaj fakuloj. La tuto donas la kvintesencon de la japana civilizacio kaj kulturo tra la historio inkluzive la nunan modernan staton. Kiu volas orientiĝi en la oceano da pri-japana literaturo jam ekzistanta, faros bone legante tiun ĉi verkon, kiu donas ĝisdatan resumon de la esenco de la mirinda fenomeno Japanio. Resumi la resumon estus senespera tasko, kiun mi nek kuraĝas nek kapablas entrepreni en la nuksoŝelo de nia modesta gazeto. Sed ĉar mi estas vivinta plurajn jarojn en Japanio, kie mi havas multajn intimajn amikojn, mi nun foliumos tra la verko kaj faros kelkajn rimarkojn pri punktoj kiuj ŝajnas al mi speciale gravaj.

Kiel multaj aliaj temoj, la japana skribsistemo meritis pli detalan diskuton ol eblis doni sur 4½ paĝoj despli ke la ideogramoj kaj silabaroj estas facile presblaj en Japanio. Al la notoj pri la **Rakonto Genzi** sur p.756 kaj 781 mi deziras aldoni, ke tiu verko de Murasaki ŝiŝibu, eble la unua romano en la mondliteraturo, estas jam ĝuebla en angla traduko tiom bonega, ke ĝi siavice apartenas al la ĝemoj de la angla literaturo.

Kiam la Portugaloj alboridigis en Japanio en 1542, ne nur Kristanismo sed ankaŭ kuglopaŝiloj estis baldaŭ importitaj kiel specimenoj de eŭropa civilizo. El tio tamen ne sekvas, ke sen la longa izolo (de 1700 ĝis 1850) de Japanio la lando estus fariĝinta kolonio, ĉar la hipotezoj de la pasinteco estas logike nedecideblaj. Filozofie interesan penson mi trovis sur p.512-3 laŭ kiu la teceremonio ("ĉa-no-you") kaj kredeble aliaj ankoraŭ prosperaj esoteraj artoj havas grandan praktikan valoron eĉ en nia moderna epoko ĉar ili reprezentas **trejnadon por trejnado**. Kiu tion ne komprenas, perpleksiĝos pri la esenco de la japana civilizo, rezulto de absoluta sinde-

diĉo kaj fleksebleco akiritaj per la praktika apliko de spirita kulturo.

Salutinda trajto trovebla tra la verko estas memkritiko anstataŭ senĉesa laŭdo de ĉio japana. Tamen, en la ĉapitro pri Hiroŝima kaj la Atombombo mankas la observo kiun mi persone faris surloke, ke en la sendube terura ekspozicio for-estas eĉ aludo al la simile terura elmon- tro de la antaŭa bombardo de Pearl Harbour lanĉita de la japanaj militaristoj, kiun mi vidis lastjare revenante el Varsovio. Verdire, la kulpo troviĝas ambaŭflanke kaj ties rekono estas la ŝlosilo por la ĝenerala elimino de milito, ĉu nuklea ĉu alispeca.

La temoj de la verko estas neelĉerpelaj sed miaj bonintencaj rimarkoj eble sufiĉos por vekti la atenton de ĉiu leganto deziranta kompreni la japanajn aferojn. La traduko fluas bone, nur mi bedaŭras, ke la iama redaktoro de 'Esperanto' de UEA ripete elmontris siajn lingvajn ekstravagancojn kiaj estas la malfacile kompreneblaj senutilaĵoj 'maljam' (anstataŭ **ankoraŭ**) kaj 'malkiel' (por mi monstra koncepto). Kun iom da japana sindediĉo kaj iom malpli da eŭropa superflueco, li sendube kapablus verki laŭ pli eleganta stilo.

—JOZEFO MAJOR, Wellington, N.Z.

ADIAŬ

En Septembro 1974, post la morto de la antaŭa redaktoro, S-ro F. R. Banham, mi transprenis la redaktadon de "The Australian Esperantist".

Estis plezuro esti via redaktoro kaj mi devas danki la multajn kontribuantojn kaj raportistojn, kiuj regule provizis materialon por nia gazeto. Dankon meritas ankaŭ la membroj, kiuj malavare donacis al la Subten-Fonduso de nia gazeto, kio ebligis pli oftan eldonadon de nia gazeto.

Cirkonstancoj nun postulas mian emeritiĝon.

Nia nova redaktoro estos **DOKTORO DONALD BROADRIBB, 17 HARRISON STREET, WILLAGEE, W.A., 6156**. Mi esperas, ke vi donos al li la saman subtenon, kiun vi donis al mi.

—HERBERT KOPPEL.